Va jaro. — No 61 Unu numero : 6 SPESDEKOJ (15 centimoj) 30 Aŭgusto 1909

ESPERANTO

OFICIALA ORGANO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Duonmonata Internacia Gazeto

Direktoro : HECTOR HODLER

ABONO

Jara Abono. . . . . 1,60 ₷ (4 frankoj)

La abonoj komenciĝas de la 1a de ĉiu monato. Oni akceptas nur unujarajn abonojn. Oni abonas ĉe la Administrejo, Esperanto-Oficejoj kaj lokaj Agentoj.

Redaktejo & Administrejo : 8, rue Bovy-Lysberg, GENÈVE (Svisujo).

REKLAMO

Ĝeneralaj Agentoj : Esperanto, 8, rue Bovy-Lysberg, *Genève* (Svisujo); G. Warnier, 15, rue Montmartre, *Paris;* C.-A.-G. Browne, 20, Wellington St., Strand, *London W.-C.;* Germana Esp. Librejo, Rathausstr, 52, *Leipzig*.
Vidu la tarifon sur la 4a paĝo

Al nia Legantaro

Ĉar la ĝisnuna sespaĝa presado de nia gazeto prezentis diversajn maloportunaĵojn, precipe el la vidpunkto de la rapideco de la presado, ni decidis aperigi ESPERANTO laŭ kvarpaĝa formato, kompense pligrandigata. La teksto restos do tiel ampleksa kiel antaŭe kaj ni aliparte povos pli rapide presigi la gazeton kaj certigi ĝian regulan aperadon. Samtempe ni per la akiro de novaj kunlaborantoj penis ankoraŭ plilarĝigi la intereson kaj utilecon de nia gazeto. Ni do esperas, ke nia legantaro favore konsideros tiujn plibonigojn kaj daŭrigos fidele diskonigi ESPERANTO por ebligi novajn baldaŭajn progresojn.

ESPERANTO.

◆

POPOLA ESPERANTA KULTURO

Ĉu vi rimarkis, kiel malfacile estas al profesoro, kiu volas instigi siajn lernantojn, ke ili parolu Esperante ?

Antaŭ kelkaj semajnoj, mi ĉeestis tian kurson en X... kaj aŭdis jenan interŝanĝadon de paroloj :

Profesoro : « Kie vi naskiĝis ? — *Lernanto :* En X... — Ĉu ĝi estas granda urbo ? — Ne, Sinjoro. — Ĉu ĝi estas bela ? — Jes, Sinjoro. — Ĉu vi jam vojaĝis eksterlanden ? — Ne, Sinjoro... k. t. p. ».

Memkompreneble, tio nur por la profesoro estas ekzerco de parolado, kaj por la lernanto nur de komprenado, kaj tio ĉi estas ja utila. Sed post kelkaj momentoj, kiam, dezirante ke la lernanto komencu mem konstrui frazojn, la profesoro demandas lin : « Ĉu vi volas rakonti al mi la promenadon, kiun vi faris lastan dimanĉon ? » — la lernanto duone malfermas la buŝon....., sed neniu vorto konsentas eliri ; aŭ, se li decidas ekparoli, la vortoj plej ofte elfluas en lia nacia lingvo.

Kiu estas do la kaŭzo de tiu fenomeno ? Certe, unue, la nesufiĉa kono de nia lingvo kaj de alkutimiĝo ĝin paroli. Sed la vera kaŭzo estas pli grava kaj pli profunda. La suprecitita lernanto ne povis rakonti sian promenadon, ĉefe ĉar, ĝin farante, li ne pensis, li ne parolis en Esperanto kun siaj kunuloj. Sekve, se li volas paroli al vi pri ĝi, li devas traduki ĉiujn impresojn kiujn li sentis, ĉiujn interparolojn faritajn ; kaj ni scias, ke traduko ĉiam estas peniga.

Sed ni bone notu, ke la malfacileco de traduko malmulte devenas de la nesufiĉa scio de la lingvo, en kiun ni volas traduki. Vi bone scias vian nacian lingvon : vi ankaŭ bone scias Esperanton, kaj vi aŭdis, mi supozas, la belegan kaj tiel pensoplenan paroladon de nia majstro en Londono, en la « Guildhall » post la Cambridge'a Kongreso. Vi ĝin tre bone komprenis, vi ĝin relegis poste, kaj, verŝajne, vi iam provis rediri al viaj esperantistaj amikoj, per via nacia lingvo, la ĉefajn ideojn prezentitajn de Dro Zamenhof en tiu parolado. Ĉu vi ne konstatis, kiel malfacila estas tia tasko ? La vortoj venas al vi ne en via nacia lingvo, kiun vi tamen plej bone scias, sed en la lingvo de la parolinto, kaj en la formo mem, en kiu li parolis. Vi volonte ripetus tion, kion vi aŭdis, iom ŝanĝante, pro la malfideleco de via memoro, dum per traduko, al vi tre peniga, vi konscias ke vi liveras nur tre palan rebrilon de la de vi klarigotaj ideoj.

Ekzemplojn de tiu fakto ni povas trovi eĉ en nia propra nacia lingvo mem. Ĉu vi iam sukcesis, ke via solicitoro aŭ via notario klarigu al vi leĝosciencan punkton, uzante por tio la ordinaran nacian lingvon ? Verŝajne, vi ne sukcesis. Via solicitoro, dum li parolas pri leĝosciencaj aferoj, estas kiel vi, dum vi parolas pri esperantistaj aferoj ; li ripetas la vortojn, la frazojn kiujn li legis en la kodeksoj, aŭ kiujn li aŭdis en la aŭdiencoj : sed ilin traduki estus al li peniga, — kaj eĉ, ŝajnas, kvazaŭ humiliga laboro.

Kaj ne pensu, ke la malfacileco por via solicitoro, paroli en la ordinara lingvo, kuŝas nur en tio, ke li bezonas, por la aferoj de sia profesio, tute specialajn teknikajn terminojn, je kiuj ne estas ekvivalentaj vortoj en la komuna lingvo. Vidu, ekzemple, la sportajn terminojn. En ĉiuj lingvoj oni povas tre ĝuste traduki la anglajn vortojn *ready, play, out,* uzitajn en la tenisludo. Kaj tamen, vi konstatas kiel mi, ke la tenisludantoj neniel konsentas ilin traduki, sed simple ilin ripetas, kvazaŭ ili estus por tiu ludo nepre bezonataj, kiel la pilko kaj la reto.

Jes, traduko estas ĉiam malfacila kaj peniga. Ĝi estas laboro de lertulo, de sciencamanto. En la ordinara vivado, dum la ĉiutagaj aferoj, la homoj *ne tradukas* : ili simple *ripetadas.* Iliaj paroladoj estas kiel mozaiko, farita el la izolaj vortoj kaj ĉefe el la tutaj frazoj, iam senkonscie enirintaj en ilian kapon kaj ĉe la taŭga okazo simple ripetataj.

El tio rezultas, ke Esperanto estas bone parolata, kiel vere vivanta lingvo, nur de tiuj homoj, kiuj donis al ĝi gravan rolon en sia ĉiutaga vivo, kiuj ofte pensis, multe lernis, iagrade per ĝi ankaŭ sin pliperfektigis science kaj morale ; unuvorte de tiuj, kiuj havas tion, kion oni jam povas nomi *esperanta kulturo.*

Cetere tiu esperanta kulturo estas nuntempe ankoraŭ tre embria. Ĝi konsistas preskaŭ nur el plena kompreno de la interna ideo de Esperantismo kaj de ĝiaj manifestadoj, kaj el kono de tiuj tradukoj el ĉiuj lingvoj, kiuj konstituas, kiel skribas Prof. Cart en la antaŭparolo de *Pola antologio*, la fundamenton de la estonta de Gœthe jam antaŭvidita « Weltliteratur », — tutmonda literaturo. Sed venis nun la tempo, ke ni faru novan paŝon antaŭen.

Inter la personoj kiuj ĉeestas niajn Esperanto-kursojn, speciale interesindaj estas tiuj gejunuloj, kiujn allogas la ideo, ke Esperanto estas al ili prezentita sub la aŭspicioj de progreso kaj moderna civilizacio; kiuj, en sia spirito, ne povas disigi Esperanton de vojaĝado, de aerveturado, de sociaj kaj ekonomiaj temoj, de ĉio entute, kio, en nia tempo, okupas la pensojn de ĉiuj agemaj kaj progresemaj homoj.

Decidante lerni Esperanton, tiuj gejunuloj esperis trovi en nia anaro tiun atmosferon de moderneco kaj de intensa vivado, kiun ili ŝatas, kaj malfermi al si novan fenestron, tra kiu ili rigardados sur la mondon de la inteligentularo kaj de la agemaj nuntempuloj. Por ke ĝi estu taŭga por tiuj ĉi gejunuloj, la Esperanta kulturo devas esti internacia, moderna kaj *popola.*

Ni do verku por ili multajn librojn. Sed ni speciale nun bezonas teknikajn librojn, kaj ĉefe lernolibrojn, originale kaj esperante verkitajn pri ĉiuspecaj temoj : geografio, historio, komerco, socia kaj politika ekonomio, juro, sciencoj. La unue verkotaj el tiuj lernolibroj estu tre simplaj, facile kompreneblaj por neinstruitaj homoj ; la enhavo estu prezentata laŭ ĝenerala, nepre internacia kaj neŭtrala karaktero, kaj la libroj estu maldikaj kaj ne tro kostaj.

Tiel, per tiuj lernolibroj, la gejunuloj povos, ĉu private post sia labortago, ĉu en specialaj vesperaj kursoj organizotaj por tiu celo, iom pligrandigi la sumon de konoj akiritaj en la unuagradaj lernejoj. En la diritaj kreotaj kursoj, la profesoroj senpene trovos temojn por paroligi la lernantojn, kiuj, aliparte, baldaŭ sukcesos flue skribi kaj paroli en Esperanto, sen ia malfacileco, pri la temoj, kiujn ili estos lernintaj per ĝi. Plie, ni estu certaj ke, per tia kunlaborado en ĝenerala edukado de la junularo, ni havigos al nia afero la favoran helpon de la progresemaj registaroj, kaj la popolan dankadon.

Th. Rousseau.

SOCIA VIVO

KONGRESOJ & FESTOJ

Kontraŭ la Tuberklozo ; Nova konferenco internacia kunvenas en Stockholm

La 8a internacia konferenco kontraŭ la tuberklozo kunigis 250 delegitojn el 22 landoj ; ĝin prezidis Sro Léon Bourgeois, eksministro franca, konata pro sia partopreno en ĉiuj aferoj de socia solidareco. En sia malferma parolado li insistis pri la progresoj de la antituberkloza batalado. « Du ciferoj, li diris, montras, kiel, ekster tiu speciala malsano, povas efiki saniga agado energie farita. En 15 jaroj la morteco en Svedujo falis de 17,7 ĝis 14,30/0 ; dume, la loĝantaro altiĝis de 4.908.213 ĝis 5.337.055. »

Alia kunveno estis dediĉita al la raportoj pri sanatorioj. Dro Paunwitz deklaris, ke ili estas, la plej efika kuracilo kontraŭ la tuberklozo, kiun li diras kuracebla, Antaŭ la gereĝoj, kiuj deziris ĉeesti la diskutojn pri la « tuberklozo ĉe la lernejo ». Dro Altschul, el Praha, diris ke laŭ li la tuberklozo ne estas hereda malsano. Oni devas, en la lernejo, kontraŭbatali la inklinon al ĝi kaj konstati ĝian ekziston kiel eble plej rapide. Li antaŭ ĉio proponas antituberklozan edukadon kaj insistas pri tio, ke la lernolibroj pri tio disdonotaj al la infanoj estu verkataj de kuracistoj, ne de pedagogoj. Dro Morin, el Svisujo, fervore parolis pri la suno kaj sunbanoj kiel kuraciloj, rimedo aparte efika ĉe la montolandoj kaj marurboj.

Al la kongresanoj kompreneble ne mankis la invitoj, festenoj kaj ĝardenakceptoj. Ili ankaŭ havis la privilegion fari neordinaran vojaĝon, nome al Laponio, kiun konas multaj turistoj. Nur de ne longe la fervojo de Narvick, la plej norda el Eŭropo, igis Laponion vizitebla. En ĉi tiuj regionoj, kiujn la akreco de la klimato faras preskaŭ neloĝeblaj dum granda parto de l'jaro, oni trovas belegajn pejzaĝojn, grandiezajn vidaĵojn, potencajn akvofalojn, mirindajn lagojn, kiujn la kongresanoj tre certe konigos ĉe sia reveno hejmen. Ĉiutage la telegrafio nin informis pri la admiro kaj kontentiĝo de la vizitantoj. Tia spektaklo sendube rekompencis la veturadon al Stockholm de tiaj eminentaj sciencistoj.

A. F. (Stockholm).

IVa Internacia Kongreso di Gimnastiko

Okazis la 1an 3an de aŭgusto en la belege lokita urbo Luxemburg, antaŭ ĝia malkonstruo en 1867 unu el la plej fortaj fortifikaĵoj en Eŭropo, kies oni ankoraŭ nun povas admiri grandajn partojn.

Partoprenis pli ol 90 societoj el 6 diversaj landoj : Francujo, Belgujo, Holando, Italujo, Bohemujo kaj Slovenio krom la 28 el 31 gimnastik-societoj kiuj ekzistas en Luksemburgo, inter ili diversaj virinaj societoj, precipe tiuj el Rotterdam, Genovo kaj Romo kaj neoficiale tri germanaj societoj el Lotaringujo.

Dimanĉe jam je la 6a matene komencis la ekzerdadoj sur la grandega kampo kie ĉiujare je la fino de aŭgusto okazas la trisemajna granda foiro, poste la konkurso inter la plej bonaj gimnastikistoj el ĉiu lando, en kiu la Francoj obtenas unuan premion.

Posttagmeze festa kortego tra la ornamita urbo kaj festeno en urba festodomo, al kiu oficialaj personoj partoprenas. Poste 1.600 gimnastikistoj plenumas senaparatajn ekzercadojn, kiujn ordonis el la kupolo de la honora tribuno la luksemburga deputato Aloys Kayser, ĝenerala direktoro de la organiza komitato. Ĉeestis la ŝtatministro Eyschen, kiu ankaŭ estis donacinta premion, akiritan poste de la Italoj.

Vespere iluminado de la urbo, koncerto de la militkapelo kaj publika balo. Lundo daŭrigo de la konkursoj kaj disdono de la premioj. La tria tago estis dediĉita al ekskursoj, el kiuj unu al la grandegaj luksemburgaj industriejoj Esch & Differdange, alia al la Moselo kun la banloko Mondorf kaj vincentro Remich, tria fine al « luksemburga Svisujo » Müllerthal ĝis Echternach, pri kies ĉarmeco mi esperebla raportos alian fojon.

HAŜJI (Luxemburg).

Dum la 17a internacia Kongreso de la Kristanaj Unuiĝoj de Junaj Viroj la Esperantistoj kunvenas

Jam preterpasis la gravaj tagoj de tiu ĉi internacia Kongreso de Kristanaj Junuloj, sed certe restos belaj memoroj en la koroj de la partoprenintoj. Por inde akcepti la delegitojn, kiuj alvenis el ĉiuj partoj de la mondo la urbo estis ornamita per multaj flagoj kaj girlandoj. Antaŭ la stacidomo oni stariĝis honorpordegon kun la akcepta saluto en tri lingvoj. En la hotelo « Vereinshaus » oni aranĝis la akceptejon por la fremduloj, kiuj alvenis je mardo, la 27an de Julio. Kune kun la germanaj partoprenintoj oni kalkulis proksimume 3,000 personojn kiuj ĉeestis la kongreson.

Inter la diversaj landaj kaj naciaj koloroj oni kelkafoje ekvidis la verdan stelon, kiu entuziasmigis la samideanojn. Kaj efektive, la granda malhelpo de la diverslingveco montriĝis en tiu ĉi kongreso tiel forte, kiel neniam antaŭe; pro tio la sopiro al komuna lingvo pleniĝis ankaŭ la korojn de neesperantistoj. Jam en la malferma kunsido oni tion rimarkis. La urbestro de Barmen faris salutparoladon en germana lingvo. Ĝi daŭris 20 minutojn. La negermanoj jam enuis. Poste li ripetis la tutan paroladon en angla lingvo ; la enuo de la Germanoj fariĝis multe pli granda. Fine li ankaŭ paroladis 20 minutojn en franca lingvo, tiel ke multaj aŭskultantoj (granda parto) tre malpacienciĝis. Dum la tuta kongreso mankis bonaj tradukistoj kaj oni aŭdis multajn neperfektajn paroladojn. Spite tiuj ĉi faktoj la estraro de la kongreso malpermesis tre vastan propagandon de la lingvo Esperanto. Sed tamen la samideanoj el Barmen kaj Mülheim kaj la redakcio de « Dia Regno » ne timis elspezojn por propagando kaj ili estis fervore subtenataj de multaj samideanoj, kiuj ne povis ĉeesti. Ĉe tri stacidomoj oni elpendigis afiŝojn, same en la akceptejo.

La Barmenaj gazetoj enhavis detalajn artikolojn pri la Esperanta afero. En ĉiuj Barmenaj kaj kelkaj Elberfeldaj unuiĝoj oni disdonis invitojn por la Esperanta kunveno. La Esperantista kunvenejo, kiu troviĝis en la Unuiĝa domo : Emmanuel, enhavis belan ekspozicion de Esp. gazetoj kaj libroj. Super la enira pordo flirtis la verda flago kun la amata stelo.

Je la 28a de Julio, vespere okazis la unua Esperantista kunveno. Gaje eksonis la kantoj el la Kristana Esperanta kantareto kaj post malfermo de la kunsido per Sro. Hübner paroladis Sro. Merchant el Sheffield (Anglujo) pri la neceseco de organizo en Esp. rondoj. Li proponis, fondi internacian federacion en la mondligo de la K. U. J. V., por pli efikigi nian propagandon. Pri la kunsidoj de la kungreso kiujn li ĉeestis, li tre plendis, ĉar li multe enuis pro la malrapida interkompreno.

La ĉefa kaj plej bela Esperantista kunveno okazis je la 30a de Julio vespere. Post la germana parolado de Sro. Hübner pri la graveco de Kristana Esp. afero, parolis Esperante Sro. Horner el Lisabono (Portugalujo) pri siaj spertoj en nio afero. La ĉeestantoj aŭskultis kun ĝojo liajn tre interesajn informojn. Ĉar Sro. Horner estis la ĉefa tradukisto de la kongreso, lia opinio estas plej kompetenta. Li parolas ses lingvojn ; el tiuj ĉi li plej multe ŝatas Esperanton. Dum la kongreso okazis, ke *franka* partopreninto diris al li : Hodiaŭ mi aŭdis *francan* tradukon, kiun mi *ne* komprenis. » Ni do propagandu !

Post tiu ĉi neforgesebla parolado Sro. Hübner legis la salutojn, kiujn sendis multaj samideanoj kaj Esp. societoj.

Nun sekvis la muzika parto de la kunveno kaj oni povis aŭdi la belegajn sonojn de nia lingvo en deklamoj kaj ĥoroj. Plej grandan aplaŭdon rikoltis la vira ĥoro de la Junula Unuigo Mülheim a. Rhein. Ŝajnis, ke la Esperantaj sonoj plibeligis la delikatajn akordojn kaj la mirindan harmonion. Je la fino de la bela kunveno oni decidis, kun pli granda fervoro daŭrigi la propagandon de Esperanto.

P. H. (Subdel. Mülheim).

◆

AERVETURADO

Konkurso de Aviado en Douai
La monda rekordo de alteco

La konkurso de aviado en Douai, kiun ni anoncis en antaŭa numero, okazis de la 28an de junio ĝis la 18an de Julio kaj ricevis grandegan sukceson.

Kvankam malbela vetero malhelpis ofte la eksperimentojn, entuziasma publiko ĉiutage ĉeestis multenombra en la aeriradejo, nomita Aerodromo de la Brayelle. Tiu vasta ebenaĵo kuŝas je 2 km. de Douai, kaj, surhavante nenian barilon kaj arbon, ĝi estas plej taŭga loko por la celitaj eksperimentoj.

Jen, mallonga raporto, tago post tago, pri la plej gravaj ricevitaj rezultatoj :

La 3an de Julio, Louis Blériot flugis dum 47m 17s, kovrante 42k 300 inter stangoj. (La realaj distancoj estas multe pli longaj.) Li estis devigata halti, pro brulvundo ĉe piedo, kaŭzita de varmega oleo, falinta el la motoro. La aparato de Blériot (motoro Anzani) estas unuplata, ĝi estas tre gracia kaj ŝajnas, flugante, birdon aŭ, pli bone, grandan libelon.

La 9an, vizitis la aerodromon delegitaro de l'Rusaj Duma kaj Imperia Konsilantaro, akompanita de francaj parlementanoj kaj de aliaj personoj, interialie Sro Archdeacon, la konata aerveturema esperantisto. Sro Maklakoff, deputato de la Duma, tostis je la progresoj de l'aviado kaj je la frateco inter la popoloj. Bedaŭrinde, la vento blovis kaj nur malgravaj flugadoj sukceis. La aerodromo ricevis, tiun tagon, 20.000 vizitantojn kaj 1.200 aŭtomobilojn.

La 15an, Paulhan flugis dum 1h 7m 19s, je l'alteco de 30-70m, kovrante 48k 200 inter stangoj. Li nur haltis pro manko de esenco. La aparato de Paulhan estas duplata (modelo de la Fratoj Voisin, motoro Gnome). Kiam li alteriĝis, la publiko longe aplaŭdis kaj portis lin triumfe. Per tiu flugado, Paulhan havigas al si la francan rekordon de l'daŭro sur duplata flugmaŝino. (La mondan rekordon havas Wilbur Wright, kiu flugis dum 2h 8m 33s, la 31an de decembro 1908.)

La 17an, Blériot kaj Paulhan flugadis malgravajn distancojn, samtempe. Por la nuna fojo en la mondo flugadis kune sur l'sama aerodromo du mehanikaj birdoj.

La 18an, la du samaj aviadistoj, konkursis por la premio de alteco. Baloneto troviĝis je 120m de l'tero. Paulhan, post kelkaj turnadoj, superflugas dufoje je 20m pli alte ol la balono kaj gajnis la premion. Li, per tio, havigas al si *la mondan rekordon de alteco,* por ĉiaj flugmaŝinoj. (W. Wright, antaŭa rekordulo, nur atingis 110m.) Je la alteriĝo, la ĉeestantoj rompis la barilojn kaj, delire entuziasmigitaj, alproksimiĝis de l'sentima aviadisto, gratulante kaj triumfe lin portante.

La morgaŭon Paulhan, intencis flugi de Douai al Arras, iro kaj reveno. Li atingis Arras (25k), sed malgrava akcidento malpermesis realveni Douai'on.

Mi ankaŭ devas citi Sron Bréguet kaj kapitano Ferber, kiuj, dum la konkurstempo, sukcesis mallongedaŭrajn flugadojn.

Unuvorte, la konkurso havis neesperéblan sukceson. Ni, esperantistoj, laŭte aplaŭdu tiajn sukcesojn, ĉar, post la proksima definitiva venko de l'aviado, nia kara lingvo estos preta por la fina triumfo.

Albéric-Humez (Del. Douai.)

Aerveturado kaj Esperanta vortaro.

Samtempe kiam naskiĝas nova scienco, ankaŭ naskiĝas novaj vortoj pli-malpli feliĉe elektitaj. En Esperanto, speciale en ĉi tiu gazeto, estis jam uzitaj multaj novaj vortoj rilate al aerveturada scienco. Konvenas rememorigi pri ili kaj apartigi ilian sencon, antaŭ ol reĝos konfuzeco. Memkompreneble ili estas nur proponitaj. Al la praktiko ni kun sereneco komisias la taskon forjeti ĉi tiujn, kiujn la uzado montrus netaŭgaj.

Aerveturado ni nomas la sciencon... veturi tra la aero per iu ajn aparato, tiel direktebla kiel nedirektebla.

Aerveturadon ni dividas en *aernavigado,* aŭ veturado per aparatoj pli malpezaj ol la aero, kaj *aviado,* aŭ veturado per aparatoj pli pezaj ol la aero. (Aviad' estas la radiko, multe pli oportuna ol aviaci', ie proponita.) La aparatoj por aernavigado estas nomataj *aerŝipoj* aŭ *direkteblaj balonoj* (ekz. Zeppelina aerŝipo). La aparatoj por aviado aŭ *aviadiloj* estas ankaŭ nomeblaj *flugmaŝinoj*, en senco pli larĝa kaj malpli teknika. Aviadiloj estas dividataj en *helikopteroj, ornikopteroj* kaj *aeroplanoj* (1). Gis nun nur ĉi tiuj lastaj sukcesis. Oni pri aeroplano diras, ke ĝi estas *monoplano, biplano, triplano,* laŭ tio ke ĝi havas unu, du aŭ tri surfacojn subtenajn. Ekz : Bleriot trapasis la Kanalon per monoplano kaj Wright eksperimentis per biplano.

Wright, Bleriot, Latham, k.a. estas *aviadistoj.* Oni ankaŭ povas uzi verbon *aviadi,* kiu signifas veturi tra la aero per aparato pli peza ol la aero. Ekz : Bleriot aviadis tra la Kanalo Doveron. Vortoj kiel aerflugi, aerostato, aviatoro, aviacio, laŭ ni, tute ne estas uzindaj.

Ĉiaokaze Esperanto estas pli riĉa kaj preciza ol la franca lingvo en kiu ekzistas nur unu komuna verbo por « ŝteli » kaj « flugi ».

A. R.

La Aerŝipo Zeppelin en Koln
Entuziasmo de la rigardantoj

La 5an de aŭgusto 1908 okazis la malfeliĉo de Echterdingen, kie la aerŝipo de l'grafo Zeppelin tute ekbrulis. Sed la nacia entuziasmo de la tuta popolo tuj kolektis preskaŭ 7 milionojn da markoj kaj donaĉis ilin al la grafo por konstrui novan aerŝipon kaj pliperfektigi lian grandiozan entreprenon.

Hodiaŭ je la sama tago kaj la sama horo la nova konstruita aerŝipo Zeppelin II alvenis en Kolonjo, kie ĝi loĝos en la granda halo kune kun la direkteblaj aerŝipoj Gross 3 et Parsefal 3.

Jam la 2an de tiu ĉi monato Z. 2 — tio estas la oficiala nomo — provis flugi de Frankfurt, kie ĝi ĉeestis dum kelkaj tagoj, la grandan aerŝipan ekspozicion, Kolonjon, sed en la Rejna valo estis grandega fulmotondro kiu daŭris tre longe, kaj la ventego, kontraŭ kiu Z. 2 longe vane bataladis, fine devigis ĝin ĉesigi ĝian penadon. Tiel Z. 2 nur 50 kilometrojn antaŭ la celo turniĝis kaj fluginte kun la vento reiris baldaŭ la halon en Frankfurt kiun ĝi forlasis la matenon.

Ĉar oni jam aŭdis la aerŝipon je 7h 50 matene en Bonn (pro la nebulo oni ne vidis ĝin), la loĝantoj de Kolonjo atendis ĝin tre baldaŭ kaj kiel la unuan tagon su-

---

(1) En Esperanto *aeroplano* estas speco de *aviadilo,* sed ne sinonimo kun ĝi.

Ivan H. Krestanoff
Pirdop-Bulgario

preniris sur la tegmentojn aŭ rapidis al la alteriĝa loko apud la halo antaŭ la urbego. Sed denove oni estis devigata atendi. Fine, je 10h 1/2 oni ekvidis en la plej malproksima okcidento tre mallarĝan helan strion, kvazaŭ malgranda nubeto. Tio estis, heligata de la sunradioj, la supra flanko de l'balono. La grafo ne prenis la direktan vojon, sed ĉe Bonn li forlasis Rejnon kaj faris la malrektan vojon trans Düren, la hejma urbeto de Sro Dûerr, la ĉefa inĝeniero kaj helpanto de la grafo. De Dûerr precipe tre granda kunhelpo al la nacia mondonaco estis liverata. Pro tiuj ĉi du kaŭzoj la grafo preterflugis Düren.

Ŝajne tre malrapide la aerŝipo proksimiĝis; kelkfoje ĝi manovris por montri sian direktebleon. Nun ĝi proksimiĝis pli rapide. Kolosa ekscito ekkaptis la popolon. Eksonis la granda sonorilaro de la katedra preĝejo, kiu estas tre malofte aŭdata kaj faras treege solenan tonon. Ĉiu siamaniere esprimis sian ĝojon. Multaj laŭte kantis la nacian kanton « Germanujo super ĉio », aliaj krie salutis la mirindaĵon en la aero kaj svingadis flagojn kaj tukojn, iaj ne povis reteni la larmojn pro kortuŝo. Sur majbara tegmento mi vidis unu maljunulon, kiu ŝajne tute estis forgesinta sian ĉirkaŭaĵon, ĉar li esprimis sian movon kisante kaj rekisante sian maljunan edzinon.

Nun oni povis diferenci la detalaĵojn de la konstruo kaj la personojn en la du gondoloj, oni vidis la vaporon elirantan el la motoroj. La aerŝipo longa 136 metrojn faris grandiozan impreson, majeste superflugante Rejnan en la alto de eble 120 metroj. Poste ĝi ĉirkaŭiris la 159m altan katedran preĝejon kaj en la direkto de la halo ĝi iom post iom foriĝis kaj ankoraŭ manovrinte dum proksimume 1/4 da horo apud la halo ĝi glate alteriĝis.

La amaso disiris. Oni priparolis la okazintaĵon sciante ke oni hodiaŭ spertis triumfon de la homa intelekto, ke la malnova sonĝo de la homaro fine efektiviĝis. Oni havis la sentadon : de hodiaŭ kaj el tie ĉi eliras nova epoko de la homara historio kaj ni ĝin ĉeestis.

Max Coblenzer. (Del. Koeln.)

Internacia Instituto de Esperanto

Kursoj en Barcelono

So Edmond Privat, prezidanto de l'Internacia Instituto de Esperanto, nin informas, ke la anoncitaj kursoj ne povos okazi en Barcelono antaŭ la Kongreso pro organiza malfruo kaŭzita de l'revoluciaj okazintaĵoj ; kiam okazis la revolucio, la artikolo kaj kursa programo estis jam kompostitaj por la lasta no de nia gazeto. So Privat, petis nin, ke ni ilin ĉiuokaze enpresu por ne krei ĉe la esperantistoj maltrankvilecon pri la stato de la aferoj en Barcelono, kiu estas nun plene kontentiga.

La Instituto private informis ĉiujn enskribiĝintojn pri sia posta decido. Ĝi dankas ilin pro ilia intereso en la afero kaj antaŭvidas laŭ ilia nombro bonan sukeson por la kursoj de l'Instituto ĉe la sekvantaj Kongresoj.

Kunveno kaj ekzamenoj

Mardon, 7an de septembro, post la kunveno de U. E. A. en la Barcelona Ateneo, okazos je la 11a publika kunveno de l'Instituto kun afabla ĉeesto de Dro Zamenhof.

So Privat tiam faros esperante paroladon pri « Esperanto kiel lingvo *vivanta* ». Ankaŭ oni tiam anoncos la tempon kaj lokon de la ekzamenoj de l'Instituto, kiuj okazos dum la kongresa semajno por *Atesto pri kapableco* kaj *Profesora Diplomo*.

La Instituto esperas ke multaj samideanoj provos tiujn ekzamenojn por pli poste fariĝi mem ekzamenantoj kaj reprezentantoj de l'Instituto en sia lando.

TRA LA MONDO

Banujo Wœrishofen en Bavarujo

Kiu ekpensus iri en urbo nudpiede kun nudaj tibikarnoj kaj mallongaj pantalonoj, sen ĉapelo kaj sen veŝto, tiu ĉi estus rigardata kun nepre malvigligantaj okuloj. Eĉ sinjorino, sen ĉapelo, en vesto simila al dormoĉemizo ne havus nepre kuraĝon sin vidigi ekstere ŝia dormoĉambro, en tia vestaĵo. Tamen ekzistas ejo, kie estas uzata ĉio tio, kaj konsideriĝas kiel iom komprenebla kaj ĉiutaga, kie 8.000 sinjorinoj kaj sinjoroj de ĉiuj gradoj socialaj ĝis la plej altaj estas feliĉaj sin liberigdum la varmaj somermonatoj je ĉiuj vestoj malvastigantaj kaj plue, trovi helpon kaj resaniĝadon de ĉiuj malsanoj grandurbaj.

Tiu ĉi ejo estas Wœrishofen, kuŝanta sur la antaŭlando de Alpoj bavaraj, en mezo de molegaj linioj de montetoj kovritaj per arbaroj malheleverdaj. Tie ĉi Kneipp faktigis sian akvokuracadon, transturnantan tutan medicinon, sian akvoterapion,

kiu post lia morto perfektiĝadis science per la kuracistoj.

Dum somero kaj vintro Wœrishofen estas plena de loĝantaro portanta sandalojn, de homoj gajaj, kies eksteraĵo ne suspektigas, kiujn seriozajn kaj estimindajn oficojn ili hejme okupas. Gaje, kiel geinfanoj, ili marŝadas tra kampoj kaj herbejoj, banas en la riveretoj trafluantaj ilin, kaj rilatas en bona amikeco kun la bestoj de la arbaro. Al la sciuroj ili portas tiel regule ilian furaĝon, ke tiuj ĉi malsovaĝaj bestetoj saltas rapide al ĉiuj eĉ fremduloj, kiuj sidiĝas sur benko kaj serĉas en liaj poŝoj la tributon apartenan.

Ĉie do vidiĝas tie trankvileco kaj sereneco en la vivado de la fremduloj kaj en la karaktero de la pejzaĝo, kiun limigas proksime, sude, la arĝenta Alpoĉeno.

Sed dum ekstere la vivado ŝajnas kampara kaj simpla, la vizitantoj de Wœrishofen povas ĝui la plej malgrandan plezuron, kiun prezentas aliloke la plej grandaj kaj famaj banejoj : nobla klubo internacia kun ejoj por tenisludo kaj aliaj sportoj, kazino, kun koncertĉambrego kaj legoĉambroj enhavantaj ĉiujn gazetojn konsiderindajn, hoteloj kaj pensionoj unuagradaj, plej distingaj kuracistoj, sanatorio, banejoj, baloj, koncertoj, de famaj artistoj estantaj tie ĉi por resaniĝado, je enirpago nepre malkara (por perfektigado de la banejo), aŭtomobiloj je lupago, parkoj bele zorgitaj, vojetoj tra la arbaroj, k. t. p.

Sed en Wœrishofen ankaŭ ekzistas io, kiu tre interesos niajn samideanojn, nome respektebla grupo de U. E. A. de 35 membroj, kies Delegito donas tre volonte ĉiujn informojn, kaj kies ceteraj membroj estas la plej distingaj tieaj kuracistoj, hotelistoj, pensionestroj, eĉ la urbestro kaj la « Kurverein », reprezentanto de la interesoj de la banejo.

Ĉiuj samideanoj venantaj tien ĉi povas atendi plej komplezeman ricevon kaj preferon. Kaj laŭ la internacieco de nia banejo ili povas esti certaj, renkonti samlandanojn, el kia tajn lando ili venis.

Oni bonvolu peti nian gvidfolion.

Max Reach (Delegito U. E. A.).

⁂

Niajn artikoloj ilustritaj

Ni plezure ricevas artikolojn ilustritajn pri la diversaj pentrindaj regionoj de l'terglobo. Tiuj artikoloj estos enpresataj laŭ la ordo de sia ricevo kaj tiel ke tiu rubriko estu plej internacia. Ĉiu artikolo estu nepre akompanata de kliŝaĵoj kiujn ni resendos tuj post uzo. Per la kunlaborado de ĉiuj niaj Del. & Subdel. tiu rubriko povas kaj devas fariĝi plej interesa kaj utila. Kelkaj Del. jam prave kaj sukcese uzis tiujn artikolojn por propagando pri U. E. A. ĉe la regionaj societoj turismaj, hoteloj, institucioj, k. a.

(Red).

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(U. E. A.)

OFICIALA INFORMILO

PROGRAMO DE LA KUNVENOJ DE U. E. A. EN BARCELONO

Solena Malferma Kunveno

Sub la honora prezido de Doktoro ZAMENHOF

Mardon 7a de Septembro, je 9h matene. — Paraninfo de l'Universitato.

TAGORDO

Parolado de Sro H. Bolingbroke Mudie, prezidanto de U. E. A.
Raporto pri la agado de U. E. A. dum 1909 (H. Hodler, Administra Komitatano.
Parolado de Dro L.-L. Zamenhof, honora prezidanto de U. E. A.
Raporto pri la financa stato de U. E. A. (Th. Rousseau, financa komitatano).
Disdono de la premioj de la Konkursoj de U. E. A.

LABORA KUNVENO

TAGORDO :

Proponoj pri ŝanĝoj en la regularo.
Fiksado de la kotizaĵoj por membroj kaj entreprenoj.
Diversaj komunikaĵoj kaj raportoj.

Ĉiuj kunvenoj estas publikaj. Niaj membroj kaj reprezentantoj estas nepre invitataj ĉeesti.

Dum la Kongreso, je difinitaj horoj, estos malfermata *Oficejo de U. E. A.* ĉe kiu estos aĉeteblaj niaj diversaj eldonaĵoj (jarlibroj, insignoj, gvidfolioj, markoj, k. a.). Registroj estos deponataj por ricevi aliĝojn, plendojn, proponojn, k. a. pri U. E. A.

La Komitato de U. E. A. kaj ĝiaj helpantoj kunvenos ĉiuvespere. Ĉiuj niaj membroj nepre surportu la insignon de U. E. A.

La raportoj pri la kunvenoj de U. E. A. aperos en la no de 20 septembro.

Fako : ADMINISTRADO

Bulteno de U. E. A.

Dum septembro aperos *Oficiala Bulteno de U. E. A.*, en kiu estos prezentataj por voĉdono la deziresprimoj elmetitaj de la Barcelona kunveno de U. E. A. pri la regularo kaj la kotizaĵoj. Ĝi enhavos ankaŭ detalajn instrukciojn pri la balotado de la Delegitoj, kiu laŭ la regularo devas okazi en ĉi tiu jaro.

Nacilingvaj broŝuroj.

Por respondi diversajn demandojn, ni informas, ke estas nun presitaj propagandaj broŝuroj en la jenaj lingvoj : *franca, germana, hispana, itala, rusa*. Ili estas riceveblaj en la maniero montrita sur nia anonco de kvara paĝo. La alilingvaj eldonoj estas nur en preparo.

Esperantiaj markoj.

La Esperantiaj markoj, pri kiuj ni parolis en antaŭa no, estas nun pretaj. Ili surhavas la surskribon Esperantio kaj bildon de Dro Zamenhof. Tiuj markoj estas aĉeteblaj po 1 Sd. por ekzemplero (minimumo 10). Ĉiuj delegitoj kaj Esperanto-Oficejoj ricevos rabaton da 20 % por ĉiu mendo supera al 100. Ni rememorigas ke tiuj markoj estas difinitaj por helpi al la centra kaso de U. E. A. Ili estas samtempe bonaj propagandiloj kaj utilaj pro tio, ke niaj Delegitoj havas la devon respondi antaŭ la aliaj la korespondaĵojn surstampitajn de la Esperantia marko.

NOVAJ SUBDELEGITO

Chester (Angluo). — Sro Warburton-Dobson.
Cincinnati (Usono). — Sro W. M. Ampt (1737 Millon Sk).
Cromer (Anglujo). — Sro Wilson Burn (Norwich Rd).
Foix (Francujo). — Sro S. Thilon Garton (Préfecture).
Gelsenkirchen (Germanujo). — Sro Krüger (Bochumustr. 12).
Kimi (Finlando). — Sro Salokannel.
Lie Keard (Anglujo). Sro Andrew.
Minsk (Rusujo). — Dro Niedwiedzki Podgorni 4).
Ornskoldsvik (Svedujo). — Sro Sjoegren (Tryggskontar).
Orenburg (Rusujo). — Sro Kjin (Smotritel svečnoge Zavoda).
Pasadedena (Kalifornio Usono). — Sro Mackannon (850 El Molino).
Porto-Maurizio (Italujo). — Sro L. Littardi (provinca asistanto).
Riga (Rusujo). — Sro W. Ŝmurlo (Marstallstr. 3).
Rio Grande do Sul (Brazilujo). — Sro Thierack (Saò Leopold).
Versailles (Seine, Francujo). — Sro L. Chilard (4, rue Pierre-Bertin).
Zembruk (Aŭstrio). — Sro L. Simbriger (Claudiastr. 22).

Entute 698 lokoj kun 84 del. kaj 610 subdel.

ŜANĜOJ : *Abbeville :* Sro Dro Neullies, 8, rue des Cordeliers, estis elektita delegito, anstataŭ Sro Michel Roger, eksiĝinta. — *Avignon :* Sro de Casteljan estis elektita vicdelegito. — *Bern :* Sro Schmid, Esperantio, estas nun Subdel., anstataŭ Sro Stettler. — *Breslau :* Sro P. Rumpel ne plu estas vicdelegito. — *Chalon/s/S :* Sro Balandra, Del. loĝas nun, rue Nord-de Cosmes, presejo. — *Halifax :* Sro Th. Milsom (137, Sarterhebble Rd) estas elektita Vicdelegito. — *Hull :* Sro L.-E. Hepton (40, Derringham St.) estas Subdelegito, anstataŭ Sro Coulson. — *Kopenhag :* Sino M. Schroeder (St. Kongensgade, 39) estas Subdelegito, anstataŭ Sro Skeel-Giorling, eksiĝinta pro troa laboro. *Melbourne :* Sno M. Harrison, Charlotte Place estas vicdel. — *Pilsen :* Sro O. Vlasan (Mikulasške Namesti 5) estas nun Vicdelegito. — *Sosnovice :* Sro T. Zakrzevski estas nun Vicdelegito. — *Sofia :* La Delegito estas de nun Sro D.-G. Atanasov, str. Botev, 33. — *Sydney :* Varbinte pli ol 20 membroj, Sro Watson fariĝas delegito. — *Valencia :* Varbinte pli ol 20 membroj, Sro Novejarque fariĝas delegito.

Esperantiaj Entreprenoj

(5a Listo)

SOCIETOJ

Grupo Esperantista de Dresden. P. : Von Frenkel, Dro Arnhold ; S : Schœnherr ; K : E. Bodan.
Grupo Esperantista de Grenoble. P. Pro Sentis.
Grupo Esperantista de Paris. P : C. Bourlet ; S : Chaussegros. Adr. : 3, place Jussieu.
Grupo Esperantista de Tournus. P : Augros.

GAZETOJ

Le Monde Esperantiste. Monata gazeto Esperante kaj France. Paris. Dir. : Ch. Fréchas.

FIRMOJ

Chalon-s-S. : *Presejo Balandra & Royer* (rue Nord-de-Cosmes).
Chaux-de-Fonds : *Horloĝfabriko* Aureole, *Ph. Wolf*.
Edinburgh : *Turistagentejo Mackay brothers & Kio* (31, Hanover St).
Bordeaux : *Vinfirmo Videau kaj Kio* (173, bd de Cauderan).
Bordeaux : *Vinfirmo Gredy kaj Kio* (23, rue Vauban).
London : *Vojaĝagentejo Cook kaj Kio* (Ludgate Circus).
London : *Selfridge-Vendejo* (Oxford St).
Leipzig : *Centra Komercejo por Esperantujo* (Thomasring 6).
Tournus : *Vinfirmo Bordat-Frérot*.
Tournus : *Sukeroĵejo Humbert*.

HOTELOJ

Graz : *Hotelo Kaiserkrone* (Faerbergasse).

Esperantiaj Asocioj

(2a Listo)

Grupo Esperantista de Magdeburg.
Grupo Esperantista de Hyères. P : Routis ; S : Richard.
Grupo « Verda Stelo ». *Paris-Montmartre*. S : E. Robert.
Grupo Esperantista de Chaux-de-Fonds. P : J. Wolf ; S : Fno A. Morgenthaler.

Entute 80 Esperantiaj Entreprenoj, 10 Esperantiaj Asocioj.

Fa ko Va : TURISMO

Akcepto al la trapasantoj.

Kiam ne estas speciala konsulo por ĝeneralaj informoj kaj turismo, la Del. aŭ Subdel. havas la devon akcepti la trapasantan Esperantianojn, ĉu mem, ĉu per unu el siaj reprezentantoj, kondiĉe ke li estu avertita antaŭe pri la alveno de la vojaĝanto.

Por faciligi sian restadon ĉiuj vojaĝantoj estas insiste petataj peti la *gvidfolion*, en la lokoj kie ĝi jam ekzistas. Ni sendos la bezonatajn gvidfoliojn al ĉiuj petantoj (kontraŭ 10 sd).

Ni tre rekomendas al ĉiu Del., ke li starigu ĉe la Esp.-Oficejo aŭ, se ne estas, ce sia hejmo *registron*, sur kiun ĉiuj Esperantianoj trapasantaj subskribos sian nomon, devenan urbon, daton de alveno kaj konigos sian vojaĝon. Tiuj registroj estos, pli poste, plej bona propagandilo.

La Del. aŭ la vojaĝantoj mem, al kiuj U. E. A. estis utila dum ilia vojaĝo bonvolu tion konigi al ni por la rubriko : *Esperantia vivo*.

Ni fine tre petas, ke ĉiuj membroj bonvolu adresi al ni ĉiujn plendojn pri ne sufiĉeco de la servoj en la lokoj vizitataj de ili. Ni ĉiam faros la necesan enketon pri tio. Tiel same oni konigu ĉiujn erarojn en la Jarlibro, kiujn ni forigos en venonta serio.

Rekomenda letero de Del. aŭ Subdel. ne estas necesega, ĉar la membrokarto sufiĉos. Tamen, ĝi povas utili, precipe en la komenco. Niaj Del. estas aliparte insiste petataj konigi al ni ĉiujn personojn, kiuj trouzus la servojn de nia Asocio speciale per monpetoj aŭ informpetoj ekster la agadkampo de U. E. A.

Farinte enketon, ni per la ĵurnalo informos niajn Del. pri tiaj personoj, se ili estas,

---

FELIETONO DE « ESPERANTO »

12

RAKONTO
PRI
SEP PENDIGITOJ

De Leonid ANDREJEV

Dediĉita al Lev. Nikolajeviĉ Tolstoj

IX. Terura soleco

Kaj jen estas vi Müller ! diris li subite kun profunda konvinkigo, kaj skuis la kapon, Kaj kun tiu neatendita krizo de la sento, kion tiel kaplaba estas la homa animo, li gaje kaj sincere ekridegis.

— Ah vi Müller ! Ah vi, nia kara Müller ! Ah vi nia plej belega germano ! Kaj do — vi estas prava, Müller, kaj mi, fratro Müller, mi estas azeno.

Rapide li kelkfoje ekpaŝis tra la ĉelo kaj je rea grandega miro de soldato, observinta tra l'porda trueto — li sin senvestigis ĝisnude kaj gaje, kun pleja diligenteco refaris ĉiujn dekok ekzercojn : etendis kaj reetendis sian junan, iom, maldikiĝintan korpon, kaŭris, enspiris kaj elspiris la aeron, stariĝante sur la piedpintoj, elmetadis la krurojn kaj brakojn. Kaj post ĉiu ekzerco repitadis kun plezuro :

— Jen ĉi tiel ! Jen estas la verajo fratro Müller ! — Liaj vangoj ruĝiĝis, el la poroj aperis gutetoj varmega, agrabla ŝvito, kaj la koro batis forte kaj regule.

— La afero estas, Müller, konsideris Sergej, streĉante tiel la bruston, ke sub la delikita etendita haŭto vidiĝis la ripoj — la afero estas, Müller, en tio, ke ekzistas ankoraŭ la deknaŭa ekzerco — alpendigo je la kolo en senmova spau kaj tio ĉi nomiĝis ekzekuto. Ĉu vi komprenas, Müller ? Oni prenas vivan homon, ni diru Sergejon Golovin, vindas lin kiel pupon kaj pendigas je la kolo, ĝi li mortas. Tio estas malsaĝe Müller, sed nenion fari-oni devas.

Li fleksiĝis en la dekstran flankon kaj ripetis :

— Oni devas, fratro Müller.

Je la sama sonorado de l'horloĝo, en teruro kaj angoro estis finanta sian vivon la malafeliĉa Vasilij Kaŝirin, apartigita per kelkaj malplenaj ĉeloj de Sergej kaj Musja, sed tiel malĝojege sola, kvazaŭ en la tuta universo ekzistas nur li unu.

Ŝvita kun algluiĝinta al korpo malseka ĉemizo, kun malvolviĝintaj, antaŭe krispaj, haroj, li konvulsie kaj senespere agitiĝis en la ĉelo, kiel homo suferanta neelporteblan dentodoloron. Jen li sidiĝis, jen kuradis, alpremadis la frunton al la muro, haltis kaj ion serĉadis per la okuloj, kvazaŭ li serĉis sanigilon. Li tiel sanĝiĝis, kvazaŭ li havis du malsamajn vizaĝojn, kaj la estinta, juna ien malaperis kaj ĝin anstataŭis nova vizaĝo, terura aperinta el mallumo.

La timo pro la morto venis al li subite kaj ekposedis lin potence kaj sendivide. Je l'mateno, iranta renkonten al senduba morto, li familiaris ĝin, kaj jam vespere, metita en izolĉelon, li estis atakita kaj droninta en furioza timego. Dum li mem, siavole iris al danĝero kaj morto, dum li tenis en siaj propraj manoj sian morton, eĉ ŝajne teruran, estis al li facile kaj gaje : la malgranda, kunpremiĝinta, kvazaŭ maljunulina timo sen postsigno dronis en la sento de senlima libereco, de kuraĝa kaj forta efektivigo de lia aroganta kaj sentima volo. Zonigita per la infera eksplodilo, li mem kvazaŭ fariĝis infera eksplodilo, enigis en sin mem la kruelan prudenton de l'dinamito, uzurpis ĝian fajran mortportan potencon kaj, irante en la strato inter rapidiĝemaj, ordinaraj, zorgitaj de iliaj aferoj, homoj, kiuj rapide evitadis la tramojn kaj ĉevalojn de l'veturigistoj, li sin sentis venintulo el alia nekonata mondo, kie nek morto, nek timo estas konataj.

Kaj jen subite tranĉa, sovaĝa, sveniganta ŝanĝo. Li jam ne iras kien li volas, sed oni irigas lin — kien oni volas. Li jam ne elektas lokon, sed oni metas lin en ŝtonan ĉelon kaj enŝlosas, kiel objekton. Li jam ne povas elekti laŭvole vivon aŭ morton, kiel ĉiuj homoj, sed oni nepre kaj neeviteble mortigos lin. Li, kiu unu momenton antaŭ estis enkorpiĝo de volo, vivo kaj forto, nun fariĝis mizera ekzemplo de unika en la mondo malforto, li fariĝas besto, atendanta la buĉadon, aŭ objekto, surda kaj senvoĉa, kiun oni povas transmeti, bruligi, rompi. Kion ajn il dirus, oni malatentos liajn vortojn, kaj se li estos krianta, oni ŝtopos lian buŝon per ĉifono, kaj se li ne estos movanta la piedojn, oni irigos lin kaj pendigos ; se li estos kontraŭstaranta, baraktados, kuŝiĝos teren, — oni superfortos lin, levos, ligos kaj portos ligitan al pendigilo. Kaj tio, ke tion laboron je li aŭtomate faros tiaj samaj homoj, kiel li, donas al ili novan, neordinaran kaj malbonaŭguran aspekton : aŭ de fantomoj de io mistera, veninta nur intence, aŭ de meĥanikaj pupoj kun risortoj, kiuj prenas, kaptas, kondukas, pendigas, tiregas la piedojn, tranĉas la ŝnuron, metas, veturigas, enfosigas.

Kaj de l'unua tago en malliberejo la homoj kaj la vivo ŝajnis al li ia terurega mondo de l'fantomoj kaj meĥan ikaj pupoj. Preskaŭ freneziĝinta pro teruro, li penis prezenti al si, ke la homoj ja havas lingvon kaj parolas, sed li ne povis ili ŝajnis mutaj ; li penis rememori iliajn parolojn, la sencon de iliaj vortoj, kiujn ili uzas interrilatante — sed li ne povis. La buŝoj malfermiĝas, io sonas, poste ili, movante la piedojn, disiras, kaj restas nenio.

Tion samon sentus homo, kiu estas sola en la domo, se nokte ĉiuj objektoj viviĝus, ekmoviĝus kaj ekposedus je li, homo, senliman povon. Subite estus juĝontaj lin : la ŝranko, la seĝo, la skribtablo kaj la divano. Li krius, sin ĵetadus, petegus, vokus helpon, sed ili interparolus ion sialingve kaj poste la ŝranko, seĝo, skribtablo kaj divano kondukus lin por pendigi. Kaj la aliaj objektoj rigardus tion.

Kaj ĉio estis ŝajninta ludila al Vasilij Kaŝirin, kondamnita al ekzekuto per pendigo : lia ĉelo, la pordo kun trueto, la sonorado de l'streĉita horloĝo, la akurate modelita fortikaĵo, kaj aparte tiu meĥanika pupo kun pafilo, kiu frapas per la piedoj tra la koridoro, kaj tiuj aliaj, kiuj timigas, rigardantaj lin tra la fenestreto kaj silente metas la manĝadon. Kaj tio, kion li sentis, ne estis teruro de la morto ; li eĉ preferus la morton : ĝi, malgraŭ sia deeterna enigmeco kaj malkompreneblеco, estis pli atingebla por la prudento, ol tiu ĉi, tiel sovaĝe kaj fantazie ŝanĝita, mondo. Eĉ pli, la morto kvazaŭ nuliĝis en tiu ĉi freneza mondo de fantomoj kaj pupoj, ĝi perdis sian grandan kaj enigman sencon, fariĝis io meĥanika, kaj nur pro tio timiga. Oni prenas, kaptas, kondukas, pendigas, tiregas la piedojn, tranĉas la ŝnuron, metas, veturigas, enfosigas.

Jen la homo malaperis el la mondo.

Dum la juĝo la proksimeco de la kamaradoj rekonsciigis Kaŝirin'on, kaj li ree por momento ekvidis homojn : ili sidas, juĝas lin kaj ion parolas en homa lingvo, aŭskultas kaj kvazaŭ komprenas. Sed jam dum la rendevuo kun la patrino, li kun teruro de l'homo, kiu estas freneziĝanta kaj tion komprenas, klare eksentis, ke tiu ĉi maljuna virino kun nigra tuketo — estas simpla artefarita meĥanika pupo, kiel tiuj, kiuj elparolas : « pa-pa », « ma-ma », sed nur pli bone farita. Li penis paroli kun ŝi, kaj mem ektremante pensis :

— Dio ! Ĝi ja estas pupo. Pupopatrino. Kaj jen tio estas pupo-soldato, kaj tie hejme estas pupo-patro, kaj jen estas pupo-Vasilij Kaŝirin.

Ŝajnis, ke baldaŭ li ie ekaŭdos kraketon de l'meĥanismo, frotadon de neoleitaj radetoj. Kiam la patrino ekploris, ree ekbrilis por unu momento io homa, sed post ŝiaj unuaj vortoj ĝi malaperis, kaj estis scivole kaj terure vidi, kiel fluas akvo el okuloj de l'pupo.

Poste en sia ĉelo, kiam la teruro iĝis neelportebla, Vasilij Kaŝirin provis preĝi. Ĉio laŭvide religia, kiu ĉirkaŭis lian junulan vivon en la patra komercula hejmo, lasis nur abomenan, maldolĉan kaj incitantan fundaĵon ; ĝi ne estis religio. Sed iam, eble ankoraŭ dum frua infaneco, li aŭdis tri vortojn, kiuj frapis lin per trema emocio, kaj poste ili restis dum la tuta vivo, dolĉigitaj per kvietiga poezio. Ĉi tiuj vortoj estis :

— La ĝojo de ĉiuj suferantoj.

Dum malafacilaj minutoj okazis, ke li murmuretis per si mem, sen preĝo, sen difinita konscio : « la ĝojo de ĉiuj suferantoj » kaj subite iĝis al li facile, li estis dezirinta iri al iu, kiu estis al li kara, kaj plendi mallaŭte ;

Trad. Dro J. Ostrovsky,

(Daŭrigota.)

kaj ili per tio jam ne povos uzi niajn servojn, kiujn la del. rajtos rifuzi al ili. Cetere preciza regularo estos baldaŭ difinata pri tiuj punktoj. Dume, oni apliku la ĉi suprajn instrukciojn, en okazo de bezono.

Fako VIa : KOMERCO & INDUSTRIO

Reklama subfako.

La sidejo de la rekama subfako (dissendado de reklamiloj de Esp-iaj entreprenoj) estas nun : *Universala Esperanto-Asocio reklama subfako, 15, rue Amiral-Roussin, Dijon* (Francujo).

Ĉiuj prospektoj alsendataj estos ekspedataj Stagojn plie post la ricevo. Pri la prezoj oni konsultu la Oficialan Jarlibron.

GRAVA AVIZO. — Dum la Barcelona Kongreso, la Administra fako, en propaganda celo, presigos Esperante tute pretan artikolon pri la Kongreso. Tiu artikolo estos sendata al ĉiuj Delegitoj kaj Subdelegitoj, kiuj estas treege petataj ĝin tuj traduki en sian nacian lingvon kaj presigi en la gazetojn de sia regiono. La Del. aŭ Subdel., kiuj ĉeestos la Kongreson, povos ricevi la diritan artikolon ĉe la Oficejo de U. E. A.; ili tuj ĝin sendu al kelpanto de sia urbo por traduko kaj komuniko al la lokaj gazetoj. Oni adresu al ni 1 ekz. de ĉiu gazeto, en kiu aperos tiu artikolo. Ni tre rekomendas ĉi tiujn klopodojn al niaj ĉiulokaj reprezentantoj.

Kien ni iros post la Kongreso ?

Postkongresaj ekskursoj

Ĉiu kongresano devas ĉeesti la festojn, kiujn preparas al ni niaj samideanoj de Sabadell. Sabadell estas bela industria urbo tre proksima de Barcelono (39 kilometroj). Ĝi kuŝas sur la vojo, kiu kondukas al la Monto Montserrat, mirindaĵo de Katalunujo, kiun oni ankaŭ devas viziti. La kosto de tiuj ekskursoj estas tre malkara, ĉar oni ne devas forgesi, ke en Montserrat la vojaĝanto devas pagi nenion por la loĝado.

La komitato celis aranĝi la ekskursojn tiamaniere, ke oni povu ĉeesti ĉiun, kaj ke unu ne malhelpu la alian. Ni donos jene la programon kaj prezojn proksimumajn de la ekskursoj, pri kiuj oni ricevos definitivajn informojn dum la Kongreso en Barcelono mem.

11a septembro. — *Sabato.* — La solena ferma kunsido de la Kongreso havos lokon matene kaj posttagmeze, je la 5a horo, foriros la vagonaro al Sabadell, kiu kondukas al tiu urbo en duono de horo. En Sabadell, ni estos oficiale akceptitaj de la aŭtoritatoj, vespermanĝos kune en solena festeno kaj ĝuos la belan feston (publikaj dancoj, artefaritaj fajroj, koncertoj), kiun preparas al ni la tieaj esperantistoj interkonsente kun la Loka Komitato. La industria lernejo de Sabadell preparas eldonon de portreto de Doktoro Zamenhof teksita sur silko. Por tiu portreto, laboras jam de du monatoj, ĉiutage kaj nokte, la lernantoj de tiu grava Lernejo.

Je noktomezo, tiuj, kiuj frue aliĝis kaj faris la peton al la Komitato havos en Sabadell dormoĉambron por tranokti. Sed ĉar la loko en la Hoteloj de la urbo estas limigita, oni preparis specialan vagonaron, kiu rekondukos nin al Barcelono.

Kiu ne volos resti en Sabadell, povos senhalte vojaĝi al Montserrat; sed ni konsilas ĉiujn viziti tiun urbon. La kosto de la vojaĝo al Sabadell kun vespermanĝo kaj reveno al Barcelono, aŭ restado en Hotelo de Sabadell estos ne pli alta ol 7 pesetoj!

12a septembro. — *Dimanĉo.* — Matene (je la horo, kiun oni difinos kaj sciigos dum la Kongreso en Barcelono) foriros de Barcelono speciala vagonaro al Monto Montserrat. Tiun saman vagonaron prenos la esperantistoj, kiuj restis en Sabadell. Nur vidinte ilin, oni povas imagi la belaĵojn entenatajn de tiu grandega Monto, kiu staras sur ebenaĵo tre proksima al Barcelono. La ekskursoj, kiujn oni povas fari en ĝi, estas multenombraj. Altegajn pintojn, al kiuj oni iras rajdante sur muloj, profundajn grotojn plej fantaziajn... kial priskribi? Vidu vi mem. Ni nur, memoru ke en Montserrat oni devas pagi nenion por loĝi, kaj ke la unua afero, kiun oni devas fari alveninte tien estas mendi ĉambron de la benediktoj. Oni eĉ povas kuiri al si mem la manĝaĵon sed ni konsilas al niaj samideanoj, kiuj ne estas tre lertaj en la Savarina arto, ke ili uzu la servon de la bonaj malkaraj restoracioj, kiuj troviĝas en la montaro.

La kosto de la tuta vojaĝo iro kaj reveno de Barcelono, manĝoj, kaj kelkaj ekskursoj dum tri tagoj, estos proksimume 30 pesetoj; ĝustajn senerarajn informojn oni ricevos dum la Kongreso.

Ekskurso al Valencio

En Valencio, urbo de suno, de floroj, de belaj knabinoj kaj de gajo, kuŝanta apud la maro, okazas nun Ekspozicio. Esperantistoj trovos plezuron vizitante ĝin, kaj certe ne ellasos la okazon. La ĉi tieaj samideanoj, interkonsente kun la 5a Komitato aranĝis ekskurson al Valencio, akceptante la koran inviton, kiun al ni faras la aŭtoritatoj kaj gravaj personoj de tiu urbo.

La 18an de septembro matene oni forvojaĝos fervoje, kaj oni atingos Valencion je la 7a horo vespere. Kvar tagojn oni restos en Valencio por viziti la Ekspozicion kaj ĉeesti ĉiun feston, kiun al ni oni preparas. La kosto de la vojaĝo kaj restado en bona hotelo estos maksimume 70-80 pesetojn.

Ni kreis por tiu ekskurso specialan komitaton, kiu donos al la esperantistoj ĉiun detalon kaj informon dum la Kongreso mem. Por ĉiu dezirata sciigo sin turnu de nun al Sro Andrés Pino, — str. Museo, 5, Valencio.

Ekskurso al Insuloj Balearaj

Oni vojaĝos amase al Insuloj Balearaj de Valencio post vizito de la Ekspozicio, forirante la 18an de septembro je la 3a horo posttagmeze en oportuna vaporŝipo. La restado en la insuloj dependos de la volo de la ekskursanoj; tamen, estas specialaj biletoj por grupoj, pri kiuj oni ricevos informojn dum la Kongreso mem.

Oni povos ankaŭ iri al Insuloj de Barcelono, tuj post la Kongreso kaj ne vojaĝinte al Valencio.

Por la ekskurso al Insuloj oni devas kalkuli ne malpli da 100 pesetoj da elspezoj.

Dum la Kongreso, la esperantistoj trovos specialajn sekretariojn por ĉiu ekskurso, kiuj donos al ili ĉiujn necesajn informojn kaj akceptos la aliĝilojn kaj antaŭpagojn de la ekskursoj. Ni donas ĉi tie nur la prezon de la ekskursoj, por ke la samideanoj provizu sin per la sufiĉa mono; kaj ni ne donas aliajn detalojn ĉar ni konstatis en aliaj kongresoj, ke malgraŭ ke oni penis antaŭklarigi ĉion, ne nur oni ripetas informojn jam donitajn, sed nepraj lastaj ŝanĝoj en la programoj nuligas la antaŭdonitajn informojn.

Grava avizo. — Post aktiva laborado, Sro Claramunt atingis por la Kongresanoj rabaton da 20 0/0 sur la biletoj de la jenaj Kompanioj de Vaporŝipoj inter Genovo kaj Barcelono :

Lloyd Italiano, La Veloce, Itala Ĝenerala Kompanio

Por aĉeti la rabatitan bileton, montru nur la Kongreskarton kaj la rabatbileton de la hispanaj fervojoj, kiun la Komitato sendis al la Kongresanoj.

La Faktoj

26 *Julio.* — La Kaneo. — La francaj, anglaj, rusaj kaj italaj trupoj forlasas la insulon.

27. Parizo. — Novo ministraro Briand ricevas konfidan voĉdonon de la franca deputataro.

Calais. — Aerveturanto Latham provas traveturi la Kanalon, sed falas en la akvon kaj restas vundita.

28. Madrido. — Reĝo Alfonso subskribas dekreton interrompantan la konstituciajn garantiojn en la tuta regno.

29. Leipzig. — Solenaj festoj pro la 500a datreveno de la fondo de l'Universitato.

30. Havano. — La ministraro eksiĝas.

Meksikujo. — Gravaj tertremoj detruas iujn urbojn.

31. Cherbourg. — Renkonto de la Caro kaj de Prezidanto Fallières.

Frankfurto a/M. — La direktebla aerŝipo Zeppelin, foririnta el la lago Konstanca, feliĉe malsupreniras en ĉi tiun urbon.

1 *Aŭgusto.* — Parizo. — F. Faber estas venkanto de la bicikla rondiro de Francujo.

2. Cowes. — Renkonto de la Caro kaj de Edvardo VII.

Tohonon-les-Bains. — Fermo de internacia Kongreso de la fajrestingistoj.

3. Ĝenevo. — Inaŭguro ĉe l'Universitato de internacia Kongreso de psikologio.

4. Kœln. — Inaŭguro de Kongreso pri Eŭkaristio kun ĉeesto de kardinalo Vannutelli.

5. Stokolmo. — Komenco de ĝenerala striko proklamita de la Federacio de la laboristoj.

Bogota, — La Kongreso de la reprezentantoj elektas kiel novan prezidanton de Kolumbio, Sro Gonzales Valencia.

Madrido. — La ministraro decidas, laŭ iniciato de reĝo Alfonso, abolicii la leĝon kiu permesis per pago la liberigon el la milita servado.

6. Rimino. — Inaŭguro de eksposicio de belartoj.

7. La Paz. — Solena inaŭguro de bolivia Kongreso de la reprezentantoj de la lando.

Audorfersee. — Renkonto de la Caro kun imperiestro Vilhelmo.

Lille. — La Kongreso por la progreso de la sciencо finas siajn laborojn.

Monsummano (Toskanujo). — Komenco de la festoj por la centjaro de poeto Jozefo Giusti.

Brescia. — Inaŭguro de internacia ekspozicio de elektro.

Kœln. — Fermo de la Kongreso de Eŭkaristio.

Chamonix. — Kapitano Spelterini malsupreniras sur la monto Buscada trairintinte Alpojn per balono.

10. Bantipur, Himalajo. — Laŭ depeŝo, Duko de Abruzoj plenumis la supreniron de monto Godvin Austin aŭ K. 2, atingante la plej altan punkton trafitan de homa piedo sur la montoj.

11. Romo. — Supera konsilantaro de la saneco aprobas la ŝtatan monopolon de la kinino.

Dunkerko. — Aerveturanto Paulhan per sia areoplano venkas la premion de Malo Bray Sune.

12. La Paz. — Dro Villezon estas elektita prezidanto de Bolivio.

Mainz. — Eksplodo de direktebla aerŝipo « Parsifal ».

Addis Abeba. — Ras Fessamma, sorganto de Ligg Jasu heredanto de l'trono de Abisinujo, ricevas la plenajn rajtigojn por kontroli la aferojn de la Etiopa imperio.

14. Lisabono. — Mortas Glo Cravero Lopez milita komandanto de l'urbo.

Peterburgo. — Eksplodo sur la submara ŝipo « Drakon ».

Alhucemas. — Ekbatalo inter Maŭroj kaj Hispanoj.

A. Tellini.

Esperantiaj Informoj

Arendonck (Belgujo). — Sro Heidendal, nia nova Subdel., faris paroladon pri Esperanto kaj U. E. A. la 18a julio, pri kiu raportis la gazetoj. Li ankaŭ instigis la fondon de loka grupo kaj penas starigi njan Asocion en sia regiono.

Invercargill (Nov-Zelando). — De la 25a junio ĉe la ĉiujara Regiona Konferenco de Sudlandaj geinstruistoj en la Feknika Lernejo Duvercargiu N. Z. Sro Webber, Del. U. E. A., legis tradtadon pri Esperanto kaj U. E. A. kaj faris praktikau elmontradon antaŭ atento aŭdantaro de sesdek geinstruistoj. Sro Webber ankaŭ tradukis ĉe la kunveno Esp. leterojn ricevitajn el fremdaj instruistoj, unu el kiuj Sro Svaĉina salutis la Kongreseton priskribis la Boheman edukadan sistemon kaj skribis pri la Internacia Asocio de Instruistoj.

Leipzig (Germanujo). — La 24a julio okazis ĉi tie kunveno de Esperantianoj speciale invititaj de la delegito. Jai kunveno okazos estonte ĉiu monate. Sro Koetz aparte atentigis pri U. E. A. kaj ĝiaj servoj kaj petis la membrojn disdoni la novan broŝuron pri U. E. A. varbante porĝi. Precipe priparolata estis la vizito de la svedaj lernantinoj, je kies honoro aparta granda publika festo estas preparata de la societo « Zamenhof » kaj de la membroj de la Jus fondita Esperantia grupo « Universo ».

La programo enhavos interalie ankaŭ propagandun paroladon pri la tomo « Esperanto kaj la Junularo » kaj teatran prizitadon « La glavo de Damokles ».

La Del. servis jam ofte, nome en komerca fako, al Esperantianoj kaj tre petas sendi al li tute senĝene ĉiujn demandojn koncernante sian regionon, volonte kaj akurate li kontentigos la demandantojn.

Dum la lasta monato fondiĝis Esperantia grupo *Universo* kiu havas kiel ĉefan celon uzi prakike Esperanton. Oni kunvenas ĉivendrede en la restoracio « Mariengarten » Karlstrasse no 10 ciuj membroj de la grupo estas membroj de U. E. A. kaj estas devigataj aboni ĝian oficialan organon. Dum la kunvenoj (de la 9a vespere oni nepre nur parolas Esperanton. La grupo havas 7 membrojn ĝis nun, ĉiuj trapasontaj geamikoj estas insiste petataj viziti tiun regulan kunvenon, ili estos korege akceptataj, imitenda ekzemplo.

Leeds (Anglujo). — La Internacia Komerca Instituto kiu enhavas 300 lernantojn metis Esperanton en sian tempotabelon antaŭ hi ja rojkaj jus fondis specialan sekcion por alilanduloj kiuj deziras ellerni krom la angla lingvo, la anglajn Komercajn metodojn. Kvin specialoj profesoroj donas lecionojn ĉiulage kaj tiu speciala sekcio progresas bonege. Esperanto estas la plej tanga perilo por instrui fremdam lingvon al alilandulo kaj la rezultatoj estas bonegoj. Ĉiu lernanto ricevas specialan tempotabelon laŭ sia lerteco kaj la diversaj temoj kiujn li deziras elstudi. La kvar grandaj sekcioj de la Instituto permesas al ĉiu studanto doni pli au malpli da tempo al la ellernado laŭ siaj ebloj kaj bezonoj. *La angla lingvo estas instruata per Esperanto* al tiuj, kiuj ne scias aŭ la francan, aŭ la germanan, aŭ la hispanan lingvon. Rekomendu la « Internacia Komerca Lernejo » Northern Institute al ĉiuj Esperantistoj kiuj deziras ellerni la anglan lingvon kaj la anglajn komercajn metodojn. Por ĉiuj detalaj klarigoj, sin turni al la Delegito de Leeds aŭ al Sro Jean Simonnet, Saint-Méard-de-Drôme, Dordogne (Francujo).

◆

ESPERANTIA VIVO

En ĉi tiu rubriko ni konigos ĉiujn informojn, kiuj povas interesi Esperantianojn, plimultigi la ligilojn inter ili kaj plifaciligi ilian interrilatadon, kiel anoncoj pri naskiĝoj, edziĝoj, mortoj, translokiĝoj, vojaĝoj. Ni petas ĉiujn niajn membrojn, ke ili bonvolu kunlabori al ĉi tiu rubriko, kiu memkompreneble estas tute senpaga, per alsendo de la necesaj informoj.

Naskiĝoj :

Sno Eufrosino kaj Dro G. Robin, Esp-iano el Bukareŝto, informas pri la bapta ceremonio de sia baptofilo Esperanto-Eŭgeno, filo de Ges-roj Negulescu, Vicdel. U. E. A. en Bukreŝto.

Translokiĝoj :

Sro Ed. Stetler, ĝis nun Del. en Bern, translokiĝis en Ĝenevo, kie li sin dediĉos konstante al Esperanto kaj U. E. A.

Sro Mangelsdorf, Del. en Kœtzschenbroda, translokiĝis en Magdeburg kaj fariĝis redaktoro de l'Germana Esp.-Gazeto.

Libertempoj :

En la Rejna Esperanto-Kolonio (Bad-Godesberg) libertempis S-roj Pape, el Helmstedt; A.-W. Bodger, London; Abato Richardson, konsulo el Bruxelles.

Sro Th. Cart, libertempas en La Forclaz (Valais, Svisujo).

Voĝajoj :

Ges-roj Ampt, Subdel. en Cincinnati, traveturis multajn urbojn per Esp. kaj U. E. A.

Sro Zadgorski, Esp.-iano el Sofia, tutkore dankas ĉiujn Esp.-ianojn, kiuj plifaciligis lian vojaĝon, speciale la Del. kaj konsulojn de Budapest, Wien, München, Zürich, Thalwil, Luzern, Bern, Lausanne, Genève. Sciante nur Esp. kaj bulgaran, li tamen povis tre oportune vojaĝi.

Tre multaj estas, laŭ diversaj informoj, la vojaĝantaj Esp.-ianoj kiuj sukcese uzis la servojn de nia Asocio.

Translokiĝoj :

Fino Ch. Pulvers, ekskasistino de Esp. Grupo Strassburg, loĝas nun en Basel (Svis), Dornachstr. 154. Membro de U. E. A.; ĉiam preta helpi al geesp-toj.

◆

La proksima no de ESPERANTO aperos la 20an de Septembro kun plena raporto pri la Kongreso.

Por ĉi tiu raporto la sekretarioj de la specialfakaj kunvenoj okazintaj dum la Kongreso estas tre petataj komuniki resuman raporton pri ili ĉe la Oficejo de U. E. A.

REKLAMO

Sekve de la pligrandiĝo de nia formato, la tarifo de la reklamoj estis fiksita jene :

Unu paĝo . .	$ 240	*1/8 kolono* .	$ 5
Unu kolono .	40	*1/16* — .	2.50
1/2 — .	20	*1/24* — .	1.75
1/4 — .	10		

Rabato da 25 o/o por 12 reklamoj ; 50 o/o por 24 reklamoj. Nenia alia rabajo aŭ prezo konsentata.

Sin turni al la *Administrejo,* 8, rue Bovy-Lysberg, *Genève* (Svisujo) aŭ al la *ĝeneralaj agentoj :* G. Warnier, 15, rue Montmartre, *Paris ;* Presejo de Esperanto, 15, rue Amiral-Roussin, *Dijon* (Francujo); C. et G. Browne, Wellington St., Strand, *London* (Anglujo); Germana Esperanto-Librejo, Rathausstr, *Leipzig* (Germanujo); Traduka Oficejo, 6 Schleinitzstr, *Bromberg* (Germanujo); Librejo Saharof, Tverskaja 29, *Moskvo* (Rusujo).

ESPERANTO *estas la pleij bona internacia reklamilo por ĉiuj komercistoj, industriistoj financistoj, aferistoj,*

Ĉar ĝi estas la plej legata el ĉiuj Esperantaj gazetoj,

Ĉar ĝi havas legantojn en 44 landoj de l'terglobo,

Ĉar ĝi estas la oficiala organo de U. E. A. kaj estas uzata de ĉiuj Delegitoj, Konsuloj, Esperanto-Oficejoj.

Ĉar ĝi estas gazeto, kiun oni zorge konservas, kies ĉiun numeron legas ne unu persono, sed multaj, ĉe la kursoj, grupoj, k. a.

AVIZO. — La Administrejo serĉas en ĉiuj lokoj bonajn reklamo-makleristojn. Oni sin turnu al ĝi pri la kondiĉoj kaj pluaj informoj.

ANONCETOJ

TARIFO

Korespondado. — *Unu enskribiĝo $ 0.30 (fr. 0.75). Rabato da 25 % por 6 enpresoj, kaj 50 % pour 12 enpresoj. — PI = poŝtkartoj ilustritaj ; L = leteroj ; PM = poŝtmarkoj. Niaj abonantoj rajtas unu senpagan enpreson.*

Petoj & proponoj ; Komercaj reklamoj. — *Unu linio (40 literoj : $ 0.10 (fr. 0.25). Rabato da 25 % por 6 enpresoj kaj 50 % por 12 enpresoj. Niaj abonantoj rajtas unu trilinian anonceton.*

NOTO. — Ĉia anonceto estos sendata antaŭ la 5a kaj 20a de ĉiu monato, al nia Administrejo, al la lokaj Agentoj aŭ Esperanto-Oficejoj. Pago per poŝtmandato aŭ internaciaj poŝtkuponoj.

Korespondado

Barcelona (Hispanujo). — Sro Juanico, Constitution 52 (Kun Azianoj kaj Oceanianoj). PI.

R. L. (Minnesota, Usono). — Sro Huber La Moreaux, Zimmermann. PI.

Bukarest (Rumanujo). — Fino Jacobescu Flora, str. Golesti 10. PI.

Austin (Minnesota, Usono). — Sro G. H. Gibbons. PI.

Nagyvarad (Hungarujo). — Sro J. Gabor, Nemzeti-hid. PI.

Zaragoza (Hispanujo). — Sro L. H. Martinez, Casta Alvarez 83, PI.

Stavanger (Norvegujo). — Sro Vilh. Pettersson, Hjelmelandsgade (ne kun francoj kaj bohemoj). PI.

Parc St-Maur (Francujo). — Soo Vanderrielle, 56, rue du Petit-Bois, PI.

Paris (Francujo). — Sro M. Mousse, 5, rue de Pontoise, PI.

Romorantin (L. & Ch., Francujo). — Sro H. Fauchon. PI.

Paris (Francujo). — Sro T. Touchebœuf, ĉe Sro Chambon, 83, rue César-Bertholon, PI.

Paris (Francujo). — Sro G. Parissot, 15, rue Montmartre. PI.

Lübeck (Germanujo). — Sro Hans Bruck, Seydlitzstr. 34. PI. L.

Barcelona (Hispanujo). — Sro P. Aguilo, Str. Provenza 135. PI.

Montargis (Loiret, Francujo). — Sro Desbrosses. P. M. (nek françaj, nek svedaj, nek aŭstraj).

Elec (Orlov. gub., Rusujo). — Sro Konstantino Rudnev. PK. L.

Petoj kaj Proponoj

Financoj. — Personoj dezirantaj deponi siajn kapitalojn kun plena garantio en Rusujo por 8 % jare, volu sin turni laŭ adreso : S-ro Vladimir Krajev, Tchernajevkaja, 14, *Tachkent* Sir Dariinskoj oblasti, Rusujo.

Reprezentado. — Sperta meĥanikisto kaj elektristo serĉas reprezentadon de samfakaj komercajoj. S-ro Charles Vil, lexmause, 20, rue de Soligasac, Nancy, France.

Studento. — Esp. organo de studentoj aperonta en septembro 1909 serĉas korespondantojn en ĉiuj landoj. Jarabono 1 $ (pagita antaŭ 1 sept. nur 0.75 $). Adreso : *Praha,* 516, K. Kuthan.

Trapasantoj ! — La Societo Esperantista de Kœln kunvenas ĉiujaŭde en hotelo : Frankischer Hof, Komœdienstr. 35. Gesamideanoj korege invitataj.

Bonvenantoj en Munĥeno! — La Munĥena Esperantista grupo konatigas, ke ĝiaj regulaj vesperkunvenoj okazas ĉiusemajne ĉiun lundon en la hela restoracio « Altès Hackerbraühaus », Sendlingerstrato N 75, kuŝanta en la centro de la ĉefurbo. Vizitoj de Esperantistoj ĉiam estas *treege* dezirataj.

Ofico. — Sro A. Rosenkranz (Giselastr. 25, Bielitz, Silezio, Aŭstrio) deziras oficon kiel kalkulisto, korespondisto kaj kasisto; li estas 26-jara, parolas kaj skribas pole, germane, ruse, izraelide kaj esperante. Multaj atestoj.

Dum la Barcelona Kongreso. — Serĉas junaj, gajaj geedzoj, parolantaj nur germane kaj esperante, similan sed nur alinacian paron aŭ eĉ solan sinjorinon par amikiĝo. Eble fariĝos komuna loĝado, veturado, amuzado k. t. p. ĉio kaj ĉiam per esperanto, por perfektiĝo en la uzado de la lingvo. Afablaj interesatoj bonvolu skribi letere, eble kun aldono de fotografaĵoj, kiuj estos tuj resendataj, al *Dr I. Werber, Wien, VI. Dürergasse 19, Aŭstrio.*

Novaj Gazetoj. — Ĉiu eldonanto de nova Esp-ito jurnalo (eĉ de kluba jurnaleto) estas urĝe petata sendi ekzempleron aŭ almenaŭ informon. Se iu bonkora Esper-isto havas malnovajn Esp-jurnalojn, kiujn li ne plu bezonas, mi tre danke ricevus ilin donace. S-ro H. Bailey, 31, Caversham Rd, Kentish Town London, Anglujo.

Papilioj. — Sro F. Deimann (Enggasse 10, Kœln a/Rh, Germanujo) deziras korespondi pri papilioj.

Komercaj reklamoj

TRA LA FILATELIO

Internacia monata organo de ĉiuj kolektistoj de poŝtmarkoj & poŝtkartoj. Jare : En Francujo 2 fr. 10, 0.80 $. En ceteraj landoj 2 fr. 50, 1 $, ĉe S-ro Fize, au Pastissou, Béziers (Francujo).

Koviloj sekigantaj « Perfekta » je varma aero kaj aŭtomata reguligilo ; maksimuma produktado, lastaj perfektigoj ; Katalogo ricevebla de J. Pascarel. Tours (Francujo).

Oni aĉetas diversajn neanglajn produktaĵojn por revendi ; ankaŭ riprezentado de alilandaj firmoj, kiuj dez. ion vendi per aŭkcia vendo aŭ alimaniere en Granda Britujo. Bonegaj referencoj. Sin turni al Esp. Konsulejo, 21, W. Schurbberg, Bristol, Anglujo.

Manpurigilo por ĉiu lavejo (Esperantia entrepreno). — Ĉiu homo perdas de unu minuto ĝis unu horo ĉiutage, se oni ĝin ne posedas.

Inter eminentaj Esperantistaj skribas pri ĝi Dro Pierre Corret, Versailles, Sekr. de Lingvo Internacia :

« Tre koran dankon. Estimata Samideano, por via afabla alsendo de ŝtono « Pura-Mano », kies bonegan efikon mi persone spertis k. c. »

Unu peco, 30 Sd., afrankite. Pogrande grandan rabaton.

Niles Winberg. Bengtsfors, Svedujo.

Antaŭ ol akiri domojn, dometojn, kampardomojn kaj ĉiuspecajn bienojn en Italujo, skribu al samideano *Luigi Scarselli,* via dell' Agnolo 48, Firenze (Italujo). Li akceptas ankaŭ *riprezentadon* de ĉiaj komercaĵoj.

Lernejo por Franca & Esperanta lingvoj. — En Morges (Franclingva Svis.) apud la mondfama Geneva Lago ; beleg avidaĵo ; trankvila restadejo. Esperanto-Oficejo & societo en la urbo. Favoraj kondiĉoj. Speciale rekomendata, hejma vivado. Por ĉiuj informoj, oni sin turnu al la adreso : Esperanto-domo, Morges, aŭ al Esp. Ofic. de U. E. A., S-ro Jayet (Morges).

Esperanto-Hotelo. — Ĉambroj tre komfortaj, malaltaj prezoj. S-ro A. Leclerc, 40, R. La Rochefoucauld, Paris. (Apud stacidomo St-Lazare).

Riprezentado. — Londona Agento, hav. oficejon, dez. riprez. alilandan firmon (ne alkohol). Bonaj referencoj. — « The Ronda Agency », 87, Finsbury Pavement, London E. C.

Belaj kravatoj verdstelumitaj, el atlaso por sinjoroj, kvin malsimilaj modeloj, de 0.50 ĝis 0.80 $.

Esperantaj rubandoj, No 70, el blanka atlaso kun verdaj steloj, por skarpoj, kravatoj, kaj ĉapeloj de sam-inoj ; la metro : 0,70 $.

Esperantaj flagetoj, bonegaj propagandiloj, dekdu : 1,20 $.

Ĉe Sro B. PEYRAUD,
41, rue de la Loire,
Saint-Étienne (Francujo).

Piedŝvito. — Nepra kuracilo, sendanĝera por la sano. Brissonnet, apotekisto, en Loches (L. & E. Francujo). Poŝtmandata prezo : Francujo, 1 $., alilando, 1,20 $.

Ekspeda firmo. — Firmo Krook & Person, en Lübeck (fondita 1876). Ekspedoj precipe al Dan-, Sved-, Rusujo & Finlando.

Tutmonda Esperanto-Anoncekspedo. havas la taskon kolekti anoncojn por ĉiuajn Esperanto-gazeto, por naciaj gazetoj, kongreslibroj k. t. p.; ĝi akceptas anoncojn laŭ originalaj prezoj kaj transsendas ilin al redaktoroj kaj eldonistoj.

Pri instaligo de novaj agentejoj kaj pri protektoj oni skribu al : Tutmonda Esperanto-Anoncekspedo. Th. Anding. Berlin S. W. 48.

Anonco-Ĵurnalo. — Esp. hotelistoj, profesoroj de Esp., Esp. libristoj, presistoj, k. a., enskribiĝos senpage en la rubrikoj de hotelistoj, prof., k. t. p., de aperonta Anonco-jurnalo. Sin turni al la Redaktoro, Sro S. J. de Vries, Bockhorststr., 112, Haag (Holando).

N'achetez *jamais* une machine à écrire avant d'avoir vu la machine

YOST

à écriture visible

Avec clavier Esperanto

LIBRAIRIE DE L'ESPERANTO

15, rue Montmartre, PARIS

Seul concessionnaire pour ce modèle spécial

Lingvo Internacia

ORGANE CENTRAL DES ESPERANTISTES

Fondé en 1895

Administration : Presa Esperantista Societo

33, rue Lacépède, PARIS

Abonnement annuel : Fr. **5** »

Avec Almanach littéraire : Fr. **7 50**

Un numéro spécimen est envoyé franco sur demande.

Librairie Hachette & Cie

79, boulevard St-Germain, PARIS

LA REVUO

Internacia monata literatura gazetto

Revue mensuelle internationale, rédigée en Esperanto avec la collaboration constante du Dr Zamenhof, par des rédacteurs et littérateurs de tous pays.

48 pages de texte in-8, chaque mois

ABONNEMENT

France, un an . . . **6** fr. | Etranger. . . . . . **7** fr.

Un numéro. . . . . **50** centimes

EN VENTE DANS TOUTES LES GARES

Rejna Esperanto-Kolonio

BAD-GODESBERG

Ŝatata refreŝiĝejo sur la maldekstra bordo de la Rejno, unu horon sude de Kœln, kontraŭ la « Sep Montoj ».

Perfekta Esperanto-organizacio : 2 Oficejoj de U. E. A., konsuloj kaj konsulino, Esp.-pensionoj, magazenoj, policanoj, k. t. p. Tial *bonega restadejo* por Esperantistoj, haltejo por la *kongresanoj.*

La Esp. ilustr. gvidfolion aŭ specialajn informojn petu per ilustr. poŝtkarto de la

KOMITATO POR REJNA ESPERANTO-KOLONIO

Bad-Godesberg a. Rh. (Germanujo).

La Universala Ŝlosilo

DE ĈEFEĈ

Ŝlosiloj. 10 ekz. Fr. 0,50 — 100 ekz. Fr. 3,50.
Tutoj. 10 ekz. Fr. 1,00 — 100 ekz. Fr. 7,00.
Anekdotaroj. 1 ekz. Fr. 0,25 — 10 ekz. Fr. 2,00.
Ŝlosilaro (ĉiuj aperintaj ŝlosiloj en elegante bindita volumo) 1 ekz. Fr. 1,50.

Granda elekto de insignoj
Peta plenan prezaron ĉe
INTERNACIA PROPAGANDEJO ESPERANTISTA
Merton Abbey, London, S. W.

Ĉio estas ankaŭ havebla ĉe Esperanto-Oficejoj kaj Librejo G. Warnier & Ko, 15, rue Montmartre, Paris.

I. Kongreso de Boĥemaj Esperantistoj

arangata de

CENTRA ASOCIO DE BOĤEMAJ ESPERANTISTOJ

BOHEMA UNIO ESPERANTISTA

(B. U. E.)

OKAZOS EN PRAHA

26, 27, 28, IX 1909

Fremdlandaj samideanoj revenantaj el kongreso Barcelona ne forgesu viziti nian kongreson. Ĉiuj kore invitataj.

Kongresa adreso : PRAHA-I-342. Esperanto-Kafejo-Union.

Grandaj Vinoj el Burgonjo

MOREAU-VOILLOT

BEAUNE (Côte-d'Or-Francujo)

Firmo fondita en 1876, daŭrigita de patro al filo

Honorindaj makleristoj estus akceptataj

Oni petu la prezaron esperantan

Granda Marko
" Ville de Paris "

INKOJ MIETTE

gluoj likvidaj, sigeloj

Jules MIETTE

102, Rue Amelot, PARIS-XI

Le gérant : DUVAL

Laborista Kooperativa Presejo, 15, rue Amiral-Roussin, Dijon (Francujo)

Esperanto-Movado

La Kongreso

La Loka Organiza Komitato de la V^a Kongreso dissendis la IV kaj IV cirkulerojn kun diversaj informoj pri vojaĝo al Barcelono, hoteloj, diversaj kongresaj eldonoj k. t. p. Por ĉiuj informoj oni uzu la solan, taŭgan adreson : *Esperantista Kongreso-Barcelono.*

La Internacia Organiza Komitato (51, rue de Clichy, Paris) dissendis « Specialan Instrukcion » por la uzo de la Francaj fervojoj, kiuj konsentis rabaton de 50 0/0 por la kongresanoj.

Ĉar la venonta numero de nia gazeto aperos la 20^{an} de septembro, ni donas nun la lastajn informojn pri la ĝiskongresa tempo.

Loka Patronaro de la Kvina Kongreso

(ĝis la 1^a de junio 1909)

Lia Reĝa Moŝto Alfonso XIII.

Lia Princa Moŝto Karolo de Borbono.

Sinjoro Ministro A. Maura, Prezidanto de la Ministraro.

Sinjoro Ministro de « *Fomento* ».

Sinjoro Ministro de Publika Instruado.

Sinjoro Ministro de Internaj aferoj, S^{ro} Johano de la Cierva.

Sinjoro Ministro de Ŝtato, S^{ro} Manuel Allende Salazar.

Sinjoro Enrich Prat de la Riba, prezidanto de la Provinca Deputitaro de Barcelono.

Sinjoro Allert Bastardas, Urbestro de Barcelono.

Barono de Bonet, Rektoro de la Universitato de Barcelono.

Sinjoro Pere Grau Maristany, de la Komerca Ĉambro de Barcelono.

Sinjoro Pau Alsina y Serra, urbestro de Vilassar de Mar.

Raymon Casellas, verkisto, ĉefredaktoro de la « Veu de Catalunya ».

Grafina Moŝto de Pardo Bazan, verkistino.

Sinjoro Eksministro Manuel Garcia Prieto.

Sinjoro Jose Casares, ekssenatano, profesoro de la Centra Universitato.

Sinjoro Salvador Padilla, direktoro de la Teknika ĝenerala Instituto.

Sinjoro Lerndro de Saralegui y Medina, ĝenerala Intendanto de la Armeo.

Sijnoro Jose Carlos Roca, Intendanto de la Armeo.

Markiza moŝto Villalba de los Llanos.

Sinjoro Ricardo Codorniu, inĝeniero, deputato, kaj multaj aliaj.

Specialfakaj societoj :

Studentoj, laboristoj, bankistoj

Estas memkomprenebla la tre grava rolo de nuna junularo por la plena sukceso de Esperanto. Tial ni kun granda ĝojo legas ĉiujn novajn informojn pri ĉiam pli kaj pli kreskanta aktiveco de gejunuloj en nia movado.

Tial la gesamideanoj, kiuj speciale sin okupas per la propagando inter la lernantoj aŭ favorigas la lernejestraron al nia afero, meritas nian apartan atenton kaj dankon. En tiu ĉi rilato estas jam faritaj signifaj, sukcesoj en multaj landoj : Francujo, Anglujo, Germanujo, Belgujo, Svisujo kaj aliaj. Nun, dank'al niaj ĉiamenergiaj Bohemaj samideanoj, Esperanto baldaŭ estos tre forte starigita inter la gejunularo en Bohemujo. Sinjoro Prof. I. Bradaĉ sukcesis enmeti en studentan « vade mecum » (Poŝkalendaro de bohema studentaro) detalan 40-paĝan artikolon pri Esperanto, ĝia gramatiko, organizaĵoj k. t. p. Ĉar tiu « vade mecum » estas preskaŭ senescepta apartenaĵo de ĉiu lernanto, oni povas esperi, ke granda nombro de ili aliĝos al nia afero. Post libertempo aperos en Praha la ĵurnalo « Studento » (Adreso : K. Kuthan, Praha II 516), kiu sendube multe helpos la aferon. La cirkulero de jam tre bone organizita « Studenta Rondeto Esp. » estas tre vigla kaj esperiga. Dank'al favoraj klopodoj de direktoro de duklasa urba komerco lernejo en Praha S^{ro} Fr. Trmal antaŭ la aŭtoritatoj, Esperanto aperos nun oficiale en tiu lernejo. Eble nun aperis jam en Bohemujo kaj baldaŭ aperos ankaŭ en ĉiuj aliaj landoj tiaj samaj tre agemaj, kleraj propagandistoj inter la instruistoj, ilia estraro kaj lernantaro, kia estas la sindonema estimata Direktoro de la « Montesquieu » lernejo S^{ro} F. Durieux.

Nia movado jam atingis tiel grandajn sukcesojn, ke ĝi trapaŝis jam tiun stadion, kiam sufiĉus nur grupoj, societoj, federacioj, ligoj kaj asocioj, kiuj havas tro vastan, tro ĝeneralan propagandan celon. Nia tasko, en ĝia plena amplekso, estas grandioza, nia areno estas la tuta mondo, nia celo estas influi la tutan homaron, inokuli la Esperantismon al centoj milionoj da homoj, enkondukigi nian lingvon en plej diversaj aferoj kaj fakoj de morala kaj praktika homa vivo. Por pli certe kaj sukcese plenumi iom post iom tian grandegan taskon, estas necese, ke la esperantistaro ĝin dividu en multaj malgrandaj apartaj fakoj, por ke la proksima celo estu pli videbla, la agadmaniero pli celkonforma kaj la laboro pli fruktoporta. Kiam oni konstruas ian malsimplan maŝinon, unuj aranĝas la stablojn, aliaj preparas diversajn radojn kaj radetojn, triaj-ŝraŭbojn, ŝraŭbingojn k. t. p. Tiel same estas necesaj por nia grandega konstruaĵo specialaj laboristoj.

Tial ni kun ĝojo ĉiam kore salutas la specialajn asociojn, kiel ekzemple la gravegan U. E. A. kun ĝia speciala konsularo, kun ĝiaj komerca, turista kaj aliaj fakoj, la kuracistajn (T. E. K. A.), studentajn, pedagogiajn kaj aliajn organizaciojn. Pri la grandaj multflankaj servoj de U. E. A. por nia afero ni ne parolu : ĝi estas okulvidebla por ĉiuj. Ni atentigu tie ĉi pri T. E. K. A., kiu prezentas brilan ekzemplon de tiaj fakaj organizaĵoj, kiu dum tia mallonga tempo atingis tian grandan sukceson. Ni salutu kaj deziru la samon al la aliaj ankoraŭ embriaj organizacioj, kiel la studentaj, fervoj-kaj poŝtoficistaj, farmaciistaj, laboristaj k. t. p. Pri la lasta ni povas sciigi niajn legantojn, ke ĵus estas fondita en Ĝenevo filio de asocio franca « Esperantista Laboristaro » (Paris, 23, rue Boyer); en Germanujo la laboristoj ankaŭ fervore lernas Esp. kaj fondis « Laboristan Ligon », kies prezidanto estas la tre sindonema ĝia zorganto kaj propagandisto S^{ro} Schaf.

Meritas atenton la ĵus fondita, sub la nomo « *Internacia Asocio de Bankistoj* », societo inter Bankistoj kaj Bankoficistoj, kies celo estas la plifaciligo de la bankaj aferoj per uzado de Esperanto. Por detalaj informoj sin turni al S^{ro} H. Arnhold, Bankdirektoro, 20, Waisenhaŭsstrasse, Dresden, Germanujo, aŭ al S^{ro} Rob. Pillault, 6, rue Grison, Orleans, Francujo.

La 22^{an} de majo en Edinburgo kunvenis konferenco pri « Esperanto en la Servo de la Dia Regno ». Prezidis S^{ro} Warden, ĉeestis pli ol 100 personoj, inter kiuj krom la estimata prezidanto kelkaj konataj samideanoj : Pastro Beveridge pruvas, ke Esperanto estas tre grava kaj taŭga por la misia agado kaj citis la fakton, ke en Zululando unu misiisto kun sukceso instruis Esp. 30 geknabojn ; F^{ino} E. S. Muir parolis pri Esp. inter la blinduloj ; S^{ro} Page pri traduko de la Biblio. Dum la diskutoj oni legis interesan leteron de nia konata kolonelo Pollen pri disvastiĝado de Esperanto en lernejoj, kolegioj kaj Kristanaj Unuiĝoj de Junaj Viroj en Hindujo.

Oni parolis Esperante

ĉe la Psikologia Kongreso

S^{ro} de Saussure enskribis novan belan paĝon en la historion de Esperanto en la sciencularo. Je la komenco de Aŭgusto kunvenis en Ĝenevo la *Internacia Kongreso de Psikologio*, ĉe kiu partoprenis 500 ĉiulandaj scienculoj. Krom franca,, angla kaj germana, Esperanto estis akceptita de la organizantaro kiel oficiala lingvo. En unu el la *plenaj* kunvenoj, S^{ro} de Saussure legis *Esperante* redaktitan raporton pri la utileco de Esperanto por la teknika psikologia terminologio. Inter la ĉeestantaj Esperantistoj parolis *Esperante* S^{ro} Ed. Privat (Sviso), S^{ro} Flügel (Anglo), S^{ro} D^{ro} Ostrovski (Ruso) pri la legita raporto, kiu estis samatempe disdonita al la Kongresanoj kun franca traduko. La Esperantistoj estis aŭskultitaj kun videbla intereso. Unu el la Kongresanoj, S^{ro} Lutoslavski protestis energiege kontraŭ la uzo de Esperanto, kiun lernas nur la personoj sentalentaj pri lingvoscienco !... La prezidanto de la Kongreso, S^{ro} Flournoy. mem respondis, ke la psikologoj havas bonegan okazon eksperimente konstati la taŭgecon de Esperanto por interkomprenado kaj favore subtenis Esperanton. La aplaŭdoj montris, ke la plej granda parto de la ĉeestantaro estis favora al Esperanto. Resume, sukcesa eksperimento, kiu renversis multe da antaŭjuĝoj kaj pruvis, ke Esperanto vivas kaj almilitas.

◆

BIBLIOGRAFIO

« Esperanto » raportos nur pri verkoj alsendotaj en du ekzempleroj.

Ni ricevis : *L. L. Zamenhof. Fundamento de Esperanto, Bohema eldono.* Th. Ed. Kühnl. *Praha,* librairie F. Topiĉ, II, Ferdinandova. Pr. 1 kz.

Curs complect şi practic pentru invataera limbŭ Esperanto in putine lectiuni de Dr. S. Kimel (Prezid. kaj Prof de Esp.). Gramatica si aplicati. Editiunea III de Esp. Romana. Galati, Str. Speranta, 1. 1909. Pr. 1 leu. Bone eldonita 120-paĝa lernolibro por Rumanoj.

Cheie, Nacia kaj Esp. traduko de ekzercoj en suprecitita Rumana lernolibro de la sama aŭtoro. Pr. 50 bani.

Los participios de un verbo, de lengua aux int. Esp. por Celestino Escobes Conde. Aĉetebla ĉe l'aŭtoro : Sol. 71 y 75, Calhorra Rioja (Espana). Pr. 0,40 ptas.

Vraĉebno-Sanilarnij Obzor Kostromskoj gub. kajero, V, 1909, envahas tre bonan artikolon de D^{ro} A. A. Cvetajev, ĉefdirektoro de zemstva sanitara oficejo, pri la signifo de Esp. en medicino, pri T. E. K. A.

La vizio de la poeto (urbo por la geblinduloj). La « verd-stelo » serio 3. Originale verkita angle de *ŝia Moŝto, la Reĝino Elizabeto de Rumanujo.* Trad. Esp. Kas. Eucharis. *Vendata por profito de la propagando inter la blinduloj.* Belâ fantazio de poetino Reĝino (pseŭdon. Karmen Sylva); malgranda 15-paĝa libreto, pri kiu nia Majstro diras : « Pro sia propra beleco kaj pro la nobla celo, la verketo sendube trovos tre multe da aĉetantoj ».

Memorandum de la Gener. As. de la Kuracistoj en Rumanujo pri la Kongreso en Budapesto, 8-paĝa broŝuro, en kiu la Rum. Kurac. Asocio klarigas, kial ili decidis ne partopreni la Univ. medic. kong. en Budapest. 3 1/2 milionoj da Rumanoj estas regnanoj de Hungarujo, kies registaro subpremas ilin en ĉiuj aferoj de politika kaj socia vivo. Ili limigas la liberecon de gazetaro, de kunvenoj, de studado de nacia lingvo en Rumanaj lernejoj k. t. p. Similajn plendojn pri la ŝovinismo kaj diversaj maljustecoj ni legis ankaŭ en la broŝuro de Bouŝka, kiu priskribis la maljustajn agojn de hungara registaro kontraŭ slovakoj. Ni estas certaj, ke niaj samideanoj Hungaroj malaprobas tiujn malmoralajn agojn de siaj samnaciaj potenculoj.

Alvoko. — Samideanoj dentistoj kaj dentkuracistoj ! Jam estas la tempo organizi Internacian Esp. Dentistan Asocion (I. E. D. A.), kiel la T. E. K. A., I. E. F. A. k. s. Mi proponas aranĝi kunvenon dum la Barcelona Kongreso por priparoli detale la baldaŭan organizon de I. E. D. A. Mi petas la dezirantojn partopreni tiun ĉi kunvenon informi min (Esperantista Kongreso-Barcelono por D^{ro} J. Ostrovski. Post la Kongreso-Genève, Suisse, rue de la Synagogue, 29). Kiom eble pli frue, aldonante sian konstantan precizan hejman kaj ankaŭ la provizoran Barcelonan adreson.

Ĝis la revido en Barcelono, karaj legantoj !

D^{ro} J. Ostrovski.

DIABETULOJ Nenia Malsukceso. Nenia dieto. Uzu la kuracilon kontraŭdiabetan « Autin ». Senduba resaniĝo. Vin turnu al S-ro Autin, farmaciisto, Le Mans (Francujo). Sendu al li 5 Frankojn = 2 $ poŝmandate kaj vi ĝin ricevos afranke en Francllando. Por alilando, limimpostojn plie.

TOBLER'A

bonega Svisa Lakta Ĉokolado

ESPERO

Kun Esperanto-Ĵurnalo ilustrita

ĈIE AĈETEBLA

ĈASOPIS ĈESKÝCH ESPERANTISTŮ

Kun literatura aldono « *Legolibro de Bohemaj Esperantistoj* » oficiala monata organo de bohemaj Esperantistoj kaj de centra asocio.

Bohema Unio Esperantista *(B. U. E.),* kiu unuigas tiutempe *43 societojn.* Ĉiu numero de tiu ĉi revuo enhavas po 20 paĝoj da plej bona teksto : artikoloj originalaj kaj tradukitaj, parto oficiala, esperanta movado en fremdlando kaj inter Bohemoj, bibliografio, adresaro de korespondatonj, k. t. p.

Jara abonpago : 3 qronoj ($ 1.50) Red. kaj Adm. : Praha II, 2023, *Ed. Kühnl.*

(Rabato por Societoj).

Germana Esperanto-Librejo

Kœnigstrasse 19 **LEIPZIG** Kœnigstrasse 19

LIVERAS

ĉiujn Esperantaĵojn, la plej belajn, vere arĝentajn Esperantistajn signojn

KUN LA ENSKRIBO " *ESPERANTO* "

kiel pinglo, broĉo kaj butono, po $ 0.30

kiel manumbutonoj, po $ 0.75

la multe ŝatatan kaj utilegan

Inkosorbilon ESPERANTO sen sorba papero

po unu . . . . $ 0.65

sendkostoj (eksterlande) . . . $ 0.25

Sigelmarkojn artefaritajn

po 50 ekz. . . . . $ 0.25

po 100 ekz . . . . $ 0.35

Afrankite

HAVIGAS

ĉiujn librojn, ĵurnalojn, muzikaĵojn k.t.p. Esperantistajn kaj diversnaciajn

PERAS

anoncojn ĉiaspecajn por ĉiuj germanaj gazetoj k. t. p. (tradukoj senpage)

ESTAS LA DEBITEJO DE " ESPERANTO "

(Oficiala Organo de U. E. A.)

Por Germanlando

POSTULU PREZARON

Por la Higieno de l'tualeto

(lavaĵoj, higieno de l'buŝo, la haŭto, lavado de suĉinfanoj, intima higieno)

Oni nepre rekomendas

COALTAR SAPONINE LEBEUF

BAYONNE (Francujo)

Kiun ĝiaj antisepcaj, deterŝivaj kaj cikatrigaj proprajoj akceptigis ĉe la Parizaj Hospitaloj.

En la apotekejoj — Atentu la imitaĵojn

Internacia Traduka Oficejo

Akceptas mendojn je tradukoj el la plej multaj naciaj lingvoj en Esperanton. Specialaĵoj : Tradukoj de **Katalogoj, Prezaroj** kaj ĉiuspecaj **Reklamoj.** Pago laŭ interkonsento. Turnu vin al : Bigalke & Mohwinkel. Internacia Traduka Oficejo, 6, Schleinitzstrasse, **Bromberg** (Germanujo).

Liverantoj de Mustardo kaj Amelo al la Reĝo

Laŭ privilegio

J. & J. COLMAN

(Akcia Societo)

Manufakturistoj de

MUSTARDO, AMELO, BLUIGAĴO

KAJ

BRITA RIZFARUNO

108, CANNON STREET, LONDON

kaj CARROWWORKS, NORWICH (Anglolando)

JUVELEJO CARNAVALET

M. DUFAUX, 30, rue de Sévigné

PARIS — *Métro St-Paul*

Ornamitaj porcelanoj kaj fajencoj, Sèvres kaj speco Sèvres. Antikva kaj moderna, por donacoj, edziĝoj, k. a.

Oni korespondas Esperante.

AL LA KOLEKTISTOJ

Post kelkaj jaroj, *grandan valoron* havos la plena kolekto de la gazeto.

ESPERANTO

Do, rapidu mendi ĉi tiun plenan kolekton dum ĝi estas ankoraŭ havebla po malkara prezo.

La tuta Kolekto (60 n^o j), afrankite 2 $.

Sin turni alla Administrejo (8, rue Bovy-Lysberg, Genève).

Malnovaj n-oj antaŭ 1 Decembro 1908 ne estas izole aĉeteblaj.

MEDIZINISCHE LICHT- & HERZ- u. NERVEN-

Heilanstalt-Kuracejo

por lumkuracado
por malsanoj de l'koro
kaj de l'nervoj.

vormals : ROTES KREUZ antaŭe : RUĜA KRUCO

51 Luisenstrasse **BERLIN NW. 6** *Telefono III, 3185*

Sekcio por lumkuracado

Elektra lumo kun elektrodoj de karbo, fero, hidrargo. Lumo de Roentgen. Radiado d'Arsonval kaj de Oudin kontraŭ artrito, reŭmatismo, neŭralgio, iŝialgio, furunkulozo, diabeto, k. t. p.

Radiado kaj fotografado laŭ Roentgen

Sekcio por malsanoj de l'koro kaj de l'nervoj

Esploroj per radioj de Roentgen kaj konstatado de l'agado de l'koro. Banoj kun karbacido kaj ŝprucbanoj kun pinburĝonoj. Elektraj banoj por la tuta korpo kaj por apartaj membroj. Vibromasaĝo k. t. p.

La kuracado plene anstataŭas restadon en Bad Nauheim

Prospekto laŭ deziro **KURACADO AMBULANTE. ONI PAROLAS ESPERANTE.** Du kuracistoj Direktoro : D^r. **BREIGER**

Renovigita ! Plibonigita !

★ JAPANA ★
ESPERANTISTO

日本エスペラント

INTERNACIA ILLUSTRATA MONATA REVUO

Oficiala organo de Japana Esperantista Asocio

SOLA KAJ UNUA ESPERANTA GAZETO EN LA EKSTREMA ORIENTO
LA PLEJ INTERESA, LA PLEJ ORIGINALA, LA PLEJ BONA PROPAGANDILO

Ĉiuj Esperantistoj, kiuj volas koni, la Japanon kaj Japanujon, la bela landon de l'Leviĝanta Suno, kaj kiuj volas scii pri la Ekstrema Oriento, nepre devas legi ĝin.

Ĝi baldaŭ faros tre interesan konkurson kun belaj premioj, al kiu tutmontaj abonintoj (nur abonintoj) povas partopreni.

Jara abono, ŝanĝita de 1909 : 5 fr. **(2 $)**

Nun abonante oni ricevos la plenan jarkolekton de 1909

Por specimeno oni sendu respondkuponon

Abonu rekte al « **Japana Esperantisto** », Marumouchi, TOKIO, Japanujo ; aŭ ĉe Librejo de Esperanto, 15, rue Montmartre, Paris, Francujo.

PRESEJAJ LITEROJ
MAYEUR

PARIS

ALLAINGUILLAUME, J. SALING & Cie

GRAVUR-FONDISTOJ POSTEULOJ

21, RUE DU MONTPARNASSE

ĈIUSPECAJ LITEROJ
KAJ
VINIETOJ

Specialaĵo
de
SUPERLITERAJ
SIGNOJ

Liverantoj de ĉiuj Esperantaj literoj kaj supersignoj uzataj ĉe la presejo de U. E. A. por la kompostado de Esperanto kaj ĉiuj Esperantaj presaĵoj.

ROMANA TIPOJ DIDOT ITALIKA

ĉ ĝ ĥ ĵ ŝ ŭ Korpo 7 — Bas de casse *ĉ ĝ ĥ ĵ ŝ ŭ*
Ĉ Ĝ Ĥ Ĵ Ŝ Ŭ Cefliteroj *Ĉ Ĝ Ĥ Ĵ Ŝ Ŭ*
ĉ ĝ ĥ ĵ ŝ ŭ Korpo 8 — Bas de casse *ĉ ĝ ĥ ĵ ŝ ŭ*
Ĉ Ĝ Ĥ Ĵ Ŝ Ŭ Cefliteroj *Ĉ Ĝ Ĥ Ĵ Ŝ Ŭ*
ĉ ĝ ĥ ĵ ŝ ŭ Korpo 9 — Bas de casse *ĉ ĝ ĥ ĵ ŝ ŭ*
Ĉ Ĝ Ĥ Ĵ Ŝ Ŭ Cefliteroj *Ĉ Ĝ Ĥ Ĵ Ŝ Ŭ*
ĉ ĝ ĥ ĵ ŝ ŭ Korpo 10 — Bas de casse *ĉ ĝ ĥ ĵ ŝ ŭ*
Ĉ Ĝ Ĥ Ĵ Ŝ Ŭ Cefliteroj *Ĉ Ĝ Ĥ Ĵ Ŝ Ŭ*
₷ ₷ ₷ ₷ ₷ ₷ ₷ ₷ ₷ ₷ ₷ ₷ ₷ ₷ ₷

EGIPTA KORPO 8 N° 406

ĉ ĝ ĥ ĵ ŝ ŭ ◆ Ĉ Ĝ Ĥ Ĵ Ŝ Ŭ

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

aŭ ESPERANTIO

Fondita la 28^{an} de Aprilo 1908

CELO : Plifaciligi la rilatojn inter diverslingvanoj kaj krei fortikan ligilon de solidareco inter siaj membroj. Por tio ĝi starigas diversajn internaciajn praktikajn servojn tuj uzeblajn de la personoj, kiuj partoprenas en la vivo internacia (Komerco & industrio, turismo, junuloj, informoj, k. a.)

ORGANIZO : En ĉiu regiono estas *Delegito* aŭ *Subdelegito*, kiuj reprezentas la komitaton, varbas membrojn kaj zorgas pri la funkciado de la servoj de la Asocio. Li laŭbezone estas helpata de diversfakaj *Konsuloj* (turismo, komerco, virinoj, junuloj, maristoj), kiuj havas la devon respondi pri sia fako ĉiujn informpetojn de Esperantianoj aŭ Esperantiaj entreprenoj. La *Komitato* estas balotata de la Delegitoj; la Delegitoj estas balotataj de la membroj.

SERVOJ : Senpaga liverado de informoj pri ĉiuj fakoj. — Helpado al vojaĝantoj. Helpado al junuloj, kiuj vojaĝas eksterlanden aŭ serĉas oficon aŭ deziras ellerni fremdajn lingvojn aŭ viziti alilandan universitaton, k. c. — Starigo de Esperanto-Oficejoj en ĉiu loko. — Reklamo kaj disdonado de reklamiloj. — Perado por reklamo kaj dungado. — Liverado de informoj komercaj kaj enketoj. — Juraj informoj. — Organizo de karavanoj kaj someraj libertempaj kolonioj. — Eldonado de gvidfolioj. — Instigo al eldonado de gvidlibroj. — Ekspozicioj. — Konkursoj, k. t. p., k. t. p.

ALIĜOJ : Ĉiu persono, kiu deziras aliĝi, informu pri tio la Delegiton aŭ Subdelegiton de sia loko (se estas nek Del., nek Subdel., li sin turnu al la sidejo de U. E. A.) kunsendante la jaran kotizaĵon **36 sd.** Interŝanĝe li ricevos membrokarton, kiu donos al li la rajton uzi ĉiujn servojn de U. E. A. — La grupoj, societoj, komercaj, firmoj, gazetoj, kontoroj, korporacioj, k. a., povas aliĝi kiel *Esperantiaj entreprenoj* (Kotizaĵo : **2 sm.**) kaj interŝanĝe rajtas uzi la specialajn servojn de U. E. A. starigitajn por ili. La grupoj, societoj, organizaĵoj, k. a., kies ĉiuj membroj estas samtempe membroj de U. E. A., estas *Esperantiaj Asocioj* kaj senpage ĝuas la rajtojn de la Esperantiaj Entreprenoj.

NUNA STATO : Je la 1^a de Julio, U. E. A. kalkulis 85 Delegitojn, 110 Vicdelegitojn, 560 Subdelegitojn, 465 Konsulojn, 135 Esperanto-Oficejojn, en 700 lokoj kaj 44 landoj ; ĝi havis 4500 membrojn, 68 Esperantiajn Entreprenojn kaj 10 Esperantiajn Asociojn.

KOMITATO DE U. E. A.

D^{ro} L. L. ZAMENHOF, Honora Prezidanto.
H. BOLINGBROKE MUDIE, Prezidanto, London.
H. HODLER, Vicprezidanto *(Administrado,* Genève).
Th. ROUSSEAU *(Financoj),* Dijon.
A. CARLES *(Konsuloj),* Béziers.
P. BLAISE *(Esperanto-Oficejoj,* London.
J. SCHMID *(Turismo),* Bern.
D^{ro} M. KANDT *(Komerco & Industrio),* Bromberg.
F. ROCKMANN *(Junuloj),* Magdeburg.

Sidejo : **8, rue Bovy Lysberg, Genève** (Svisujo).

OFICIALAJ ELDONAĴOJ DE U. E. A.

Oficiala Jarlibro (Plenaj informoj pri U. E. A., ĝia organizo, ĝiaj servoj kaj la maniero ilin uzi, k. a. Plena listo de la Deligitoj, Vicdelegitoj, Subdelegitoj, Esp.-Oficejoj de U. E. A.). Necesega por ĉiuj membroj. Prezo : 0,25 Sm. ; 10 ekz. 2 Sm.

Oficiala insigno (verda stelo kun blanka rando, rezervita por Esperantianoj). Prezo : 0,36 Sm.

Oficiala Marko (gluota sur la korespondaĵoj de la Esperantianoj) 1 sd. por ekzempl. (minimumo 10 ekz). Por Esp.-Oficejoj rabato da 20 % por ĉiu mendo de pli ol 100 ekz.

Oficiala leterpapero (por Delegitoj, Subdelegitoj kaj membroj) 100 folioj : 0,70 Sm.

Oficialaj kovertoj. Prezo, 100 ekz : 0,40 Sm.

Oficialaj poŝtkartoj. Prezo, 100 ekz. : 0,70 Sm.

Gvidfolioj de U. E. A. (Rekomendataj al ĉiuj vojaĝantaj Esperantianoj). Senpage riceveblaj kontraŭ marko aŭ kupono da 0,10 Sm. Oni povas mendi la gvidfoliojn aparte. Vidu la Oficialan Jarlibron.

Universala Esperanto-Asocio, ĝia celo, ĝia organizo, ĝiaj praktikaj servoj, ĝia signifo. Propaganda broŝureto. Prezo, 10 ekz. : 0,20 Sm. ; 50 ekz. : 1,50 Sm.

Oficiala Bulteno (senpaga por Delegitoj, Subdelegitoj kaj Konsuloj).

PROPAGANDAJ BROŜUROJ EN NACIAJ LINGVOJ :

Universala Esperanto-Asocio. Enkonduko, celo, organizo, praktikaj servoj, socia, signifo, konsiloj, al la interesatoj, k. t. p. Tiu bonega propaganda broŝuro, kiu klare konigas U. E. A. al la neesperantista publiko, estas nepre rekomendata al ĉiuj niaj propagandistoj.

Ekzistas ĝis nun eldonoj en lingvoj *franca, germana, hispana* kaj *itala.* Eldonoj angla, rusa kaj portugala estas en preparo. Resumoj en lingvoj *dana* kaj *holanda.*

Prezo, 10 ekz. : 0,20 Sm ; 50 ekz. : 0,80 Sm ; 100 ekz. : 1,50 Sm.

AVIZOJ : Ĉiuj mendoj estu sendataj al **Esperantio,** 8, rue Bovy-Lysberg, *Genève* (Svisujo), Tamen, nacilingvaj propagandaj broŝuroj estas ankaŭ riceveblaj el la jenaj adresoj :

D^{ro} M. KANDT, 8, Neuer Markt, *Bromberg* (Germana).
P. LINARES, Santo-Basilio, *Cordoba* (Hispana).
A. TELLINI, 12, Casella Postale, *Bologna* (Itala).

Kalkulo estas malfermata nur al Delegitoj & Subdelegitoj. Ĉiuj aliaj personoj devas aŭ mendi per sia loka Delegito, aŭ kunsendi la monon samtempe kun la mendo. Personoj, kiuj deziras rekomendigi sian mendaĵon, aldonu 0,10 Sm.